ISSN 0032-4361 12 1990

# 中國報道
# EL POPOLA ĈINIO



# UNUIĜO AMIKECO PROGRESO




# LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO




El la sesa sceno "Lumo de la Azia Sportkunveno" de la Kalisteniko "Renkontiĝo en Pekino"      Foto de **CAI HAIFENG**

# UNUIĜO AMIKECO PROGRESO



Ĉinaj kaj iranaj sportistoj en akvopilka konkurso    Foto de **XUE CHAO**



Ĉinaj gvidantoj Jiang Zemin (maldekstre) kaj Yang Shangkun (dekstre) kaj s-ro J. A. Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, rigardas bonaŭgurajojn Panpan de la sportkunveno. Foto de **WANG WENLAN**

*Agrabla estis aŭtuno de Pekino. 6 milionoj da envazaj floroj kaj sennombraj koloraj flagoj faris la antikvan ĉefurbon de Ĉinio ege bela. La pekinanoj kaj diversnaciaj popolanoj de la lando kun granda emocio bonvenigis la okaziĝon de la 11-a Azia Sportkunveno en Pekino.*

*Antaŭ 40 jaroj la ĉina popolo estis nomata "orient-azia malsanulo". Post la fondiĝo de la popola respubliko tiu malhonoro fariĝis jam historio. Nun Ĉinio unuafoje okazigis tiel grandan internacian sportkunvenon, kiu estas ankaŭ la unua azia sportkunveno okazigita de Ĉinio en ĝia 40-jara historio. La sportkunvenon partoprenis delegacioj kun 6 578 sportistoj kaj oficistoj el 37 landoj kaj regionoj, membroj de la Azia Olimpika Konsilio. La nombro de delegacioj kaj tiu de sportistoj superis tiujn de ĉiu ajn antaŭa azia sportkunveno.*

# Fajro de la 11-a Azia Sportkunveno

JE la 4-a h. posttagmeze de la 22-a de septembro 1990, post kiam sonis 11-foje la granda 500-jara sonorilo de Ming-dinastio en la Pekina Laborista Stadiono, solene malfermiĝis la 11-a Azia Sportkunveno.

Je la 5-a h. rigardate de la sportistoj kaj pli ol 70 000 ĉinaj kaj alilandaj spektatoroj, la ĉina fama pafisto Xu Haifeng, alte tenante la torĉon kaj akompanate de du ĉinaj sportistinoj, kuris en la stadionon kaj ascendis la soklon de la giganta torĉo. En huraado ekbrulis la giganta torĉo. Tiam 11 000 kurierkolomboj leviĝis de diversaj flankoj de la stadiono. La kolombaro rondflugis super la stadiono kelkan tempon kaj forflugis kun la sopiro de la azia popolo al paco.




Eminenta katara kuristo Mansoor Talal (n-ro 615) gajnis denove la ĉampionecon de vira 100-metra kuro. Foto de **ZHOU YOUMA**


Falis nokto. Rigardante la ardan flamon de la torĉo, oni nature rememoris s-ron Baron Pierre de Coubertin, iniciatinton de la modernaj Olimpiaj Ludoj. Estis li, kiu proponis bruligi la torĉon simbolantan lumon, unuiĝon kaj amikecon kaj ĝin transdoni per stafeto. Hodiaŭ lia propono estas efektivigita ankaŭ de ĉinoj.

La fajron de la sportkunveno oni elportis el la monto Nyainqen Tanglha de Tibeto. La 22-an de

Zhou Lingmei en konkurso Foto de **ZHANG YANHUI**




Kim Gwang Suk, eminenta gimnastino de DPR Koreio, en konkurso de trabado Foto de **XU XIANGJUN**



# LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO




Aplaŭdantoj Foto de **CAI HAIFENG**



Spektantoj Foto de **CAI HAIFENG**




La sud-korea ĵudisto Kim Byung-joo (malsupre) gajnis la oran medalon en konkurso de kategorio de 78 kg.
Foto de **CAI HAIFENG**



Ĉina boksisto Bai Chongguang (dekstre) gajnis la oran medalon en konkurso de kategorio de 81 kg.
Foto de **CHENG ZHISHAN**

aŭgusto Jiang Zemin, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, persone bruligis sur Tian'anmen-placo la ĉefan torĉon de la sportkunveno per tiu ĉi fajrosemo. Poste, oni portis la torĉojn suden al Sanya sur Hainan-insulo, nordokcidenten al Urumqi en Xinjiang, sudokcidenten al Lhasa en Tibeto kaj nordorienten al Harbin en Heilongjiang, kaj el la

Japanaj biciklistoj gajnis la ĉampionecon en konkurso de la vira 4-kilometra teama postkuro. Foto de **ZHOU YOUMA**



La piedpilka konkurso inter la tajlanda kaj kuvajtia teamoj
Foto de **XU XIANGJUN**





La 20-an de sept. okazis en Pekino la lasta torĉotransdona ceremonio kun partopreno de reprezentantoj de sportistoj el 34 landoj kaj regionoj.
Foto de **DU JIE**

En Tibeto, konata kiel tegmento de la mondo, lamaoj de temploj elportis muzikilojn uzatajn nur en solenoj. Ili akompanis la torĉon dum ĝia tritaga vojaĝo en la loko.

En Jilin-provinco de la Nordoriento ĉ. cento da maljunuloj kuris pli ol 10 km, sekvante la torĉon.

La 19-an de septembro la torĉo, kiu vojaĝis en la Nordoriento, la unua revenis Pekinon. En Zhoukoudian, restadejo de simihomoj, dekmiloj da loĝantoj ĝin bonvenigis. Iu junulo, transpreninte la torĉon, emocie diris: "Mi estas tre fiera. Niaj prapatroj ekbruligis ĉi tie la fajron de homa civilizacio, kaj hodiaŭ en la sama loko ekbrulas la torĉo de la azia sportkunveno."

supre diritaj urboj oni reportis stafete la torĉojn al Pekino.

Oni povas diri, ke de tiu tago la ĉina popolo sekvis la torĉojn per rigardo. Kien atingis la torĉoj, tie svarmis homfluoj.

En la provinco Hainan, kiam oni informiĝis, ke la torĉo venos al Hainan, vespere de la tago antaŭ ĝia alveno dekmilo da personoj sidis ĉe la marbordo, ekbruligis kandelojn, lumigis lanternojn kaj atendis ĝis la tagiĝo.

En Urumqi oni bonvenigis la torĉon en pluveto. Ujguraj, kazaĥaj, huj-aj kaj mongolaj aktoroj ekdancis naciajn dancojn; kaj malgraŭ la pluvo, urbanoj kun granda ĝojo ĝuis la spektaklon.

La 20-an de septembro ĉiuj torĉoj el la supre diritaj urboj atingis Tian'anmen-placon. La torĉa stafetkuro "La Fajro de la Azia Sportkunveno" daŭris 30 tagojn. La torĉoj estis transdonitaj de 170 milionoj da homoj kaj vojaĝis pli ol 180 000 km tra 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Tio estas senprecedenca en Ĉinio.

La fajro estingiĝis, tamen la vekita nacia spirito stimulos la popolon al la brila perspektivo.

(**Zhang Qingzhen**)

# Renkontiĝo en Pekino

IMPONA, emocia amasa kalisteniko "Renkontiĝo en Pekino" puŝis la malferman ceremonion de la 11-a Azia Sportkunveno al alia tajdo.

La grandioza kalisteniko konsistas el 6 scenoj. Ĝi estis prezentita de 11 200 homoj kun fono formita de 10 000 lernantoj.

La unua sceno estis "Gaja Tamburado kaj Gongado". Sur la impona fono lante elvolviĝis la bildo de la Granda Muro. Ĉe la piedo de la zigzaga muro aŭdiĝis peza klarionado. Subite leviĝis gaja tamburado kaj gongado. 425 fortikaj viroj kriante sin pafis al la ludkampo, ĉiu kun blanka tuko sur la kapo kaj fajreruĝa zono ĉe la talio. Tamburado kaj gongado estas simbolo de la ĉina civilizacio. La moro, furoranta en Shaanxi, Shanxi kaj Pekino, forte elspiras la nacian guston. El la 1 600 prezentantoj duono estis kamparanoj de la Leŭsa Altebenaĵo.

La dua sceno — "Ruĝaj Lotusfloroj sur Klara Akvo". 576 knabinoj en gaza jupo lirle eniris en la ludkampon, ĉiu kun peco da blanka muslino en la mano. Ili formis jen fonton, jen lotus-lagon, kiuj allogis al si lotus-knabinojn kaj blankajn cignojn. La ondoj, lotusoj, blua ĉielo kaj blankaj nuboj en bela

# LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO


Tali-tamburado en la malferma ceremonio

Foto de **HE YANGUANG**

muziko prezentis belan poezian etoson.

La tria sceno — "Ĉina Uŝu-o". Jen bravuloj en antikva vesto eniris en la kampon alte tenante flagon. Blankhara maljunulo kaj du infanoj faris tajĝiĉŭan-ekzercadon. Kaj amaso da homoj faris la ĉinan bokson ĉangĉŭan kaj luktadon laŭ la stilo de uŝu-o. Ĉio ĉi simbolas la longan historion kaj disvolviĝon de la ĉina uŝu-o. La kvara sceno — "Brilaj Steloj". 1 300 infanoj en vestoj flava, ruĝa, blua kaj verda dancis viglan kaj gajan dancon kaj faris gimnastikajn ekzercojn. La kvina sceno — "Viglaj Sportistoj". Pli ol 1 000 gejunuloj faris gimnastikajn ekzercojn per ringoj kaj rubandoj kaj akrobataĵojn.

Sub hela lumo la amasa kalisteniko proksimiĝis al sia lasta sceno "Lumo de la Azia Sportkunveno". 5 500 gejunuloj formis meze de la stadiono sepkoloran ĉielarkon, kiu poste ŝanĝiĝis en gigantan emblemon de la 11-a Azia Sportkunveno. Gejunuloj el la 56 nacioj de Ĉinio dancante eniris en la kampon. Akompanate de la majesta kanto "Ni havas la saman sunon kaj la saman lunon...", 10 000 koloraj balonoj leviĝis malrapide. Kaj 70 000 spektantoj ĉinaj kaj alilandaj hurais de ekstazo.

"Renkontiĝo en Pekino" estas bela speguliĝo de tiu ĉi senprecedenca sportkunveno. En kaj ekster la stadiono ĉiuj amikoj estis ĝojaj pro tiu ĉi renkontiĝo.

Post 36 jaroj sportistoj ambaŭflanke de Taiwan-markolo ŝultro ĉe ŝultro venis al la azia sportkunveno. Ili diris, ke la markolo ne povas rompi la amon de samlandanoj kaj amikecon inter sportistoj. En la sportista restoracio Ji Deg Han, gvidanto de la sud-korea delegacio, iris al Kim Yin Nam, gvidanto de la delegacio de la Korea Demokratia Popola Respubliko, kaj ĝentile tostis por li. La lasta emocie diris: "La azia sportkunveno kaj Ĉinio ebligis al ni la renkontiĝon. Ni estas el la sama nacio, el la sama sanga heredo. Ni havas la samajn lingvon, kulturon kaj morojn. Ni devas kuniĝi por partopreni la sportkunvenon."

La Hiroŝima Vizitgrupo 416-persona speciale veturis al Pekino por partopreni la malferman ceremonion, ĉar en Hiroŝimo okazos la 12-a Azia Sportkunveno. Post la malferma ceremonio ĝia grupestro diris: "Ĉinio estas la plej granda en Azio. Hodiaŭ multaj aziaj amikoj ĝoje venis en Pekinon. Tio simbolas la unuiĝon de la azianoj, prosperon kaj progreson de nia kontinento."

La malferma ceremonio donis belan rememoron al ĉiuj rigardantoj. Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, diris: "La malferma ceremonio de la 11-a Azia Sportkunveno estas unu el la plej bonaj, kiujn mi ĉeestis."

**(Zhang Qingzhen)**

Bazopilka konkurso inter la ĉina kaj Taibei-a teamoj, kiu okazis la 23-an de septembro

Foto de **ZHANG MING**



# UNUIĜO AMIKECO PROGRESO



Iranaj sportistinoj en la malferma ceremonio
Foto de **CAI HAIFENG**





Kabadi-konkurso inter la bangladeŝa kaj pakistana teamoj
Foto de **XU XIANGJUN**





La Hongkong-a uŝuisto Hai Choi
Lam en konkurso de spadado
Foto de **ZHOU YOUMA**

Lianpilka konkurso inter la malajzia kaj bruneja teamoj
Foto de **ZHOU YOUMA**



# LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO





Sportistoj de Barejno kaj Saudi-Arabio ĉe adiaŭo en la Vilaĝo de Aziaj Sportistoj Foto de **SUN YI**



Nepala arkopafisto en konkurso
Foto de **CAI HAIFENG**



Indoneziaj sportistoj kun aĉetitaj memoraĵoj Foto de **XUE CHAO**

Kantado en la ferma ceremonio de la sportkunveno Foto de **CAI HAIFENG**



# Ĉinaj sportistoj en la sportkunveno

KIAM la vira solludo de volano, la lasta konkurso de la 11-a Azia Sportkunveno, iris ĝis duono post nul horo de la 7-a de oktobro, ĝi finiĝis per la venko de ĉina sportisto Zhao Jianhua. Kaj Ĉinio gajnis 183 orajn medalojn en la sportkunveno, Sud-Koreio 54 kaj Japanio 38.

La vicoj estas samaj kiel tiuj en la 10-a Azia Sportkunveno. Sed la totala nombro de la oraj medaloj ĉi-foje gajnitaj de Ĉinio kreskis preskaŭ duoble, kaj ĉinaj sportistoj rompis 1, superis 6 kaj egaligis 4 mondajn rekordojn, krome, ili rompis ankaŭ 26 aziajn rekordojn en ĉi tiu sportkunveno.

La 22-jara ĉina biciklistino Zhou Lingmei komencis sporti nur antaŭ 6 jaroj. En la konkurso de la virina stadiona unu-kilometra biciklado en ĉi tiu sportkunveno, ŝi rompis la mondan rekordon de 1'14"249 per 1'13"899, kiun sovetia sportistino tenis dum 6 jaroj, tiel aziano unuafoje enviciĝis inter la kreintoj de mondaj rekordoj de biciklado.

En la virina halterleva konkurso de kategorio de 44 kg la 17-jara ĉina halterlevistino Xing Fen sukcesis levi 95-kilograman halteron, superante la mondan rekordon de ŝirlevo je 2.5 kg. kaj per la totala pezo de 165 kg gajnis la oran medalon.

Ĉinaj sportistoj atingis deziratajn sukcesojn en fortaj sportobranĉoj, kiel gimnastiko, plonĝo, virinaj flugpilko kaj piedpilko, sur kiujn oni metis grandan esperon. Ili gajnis ĉiujn 8 orajn medalojn por la plonĝaj konkursoj kaj ĉiujn 14 orajn medalojn por la remkonkursoj. El la 13 oraj medaloj por la kajakaj konkursoj 10 estis gajnitaj de Ĉinio.

Menciindas, ke en iuj sportobranĉoj ne tiom fortaj por Ĉinio, ĝiaj sportistoj akiris bonajn sukcesojn. Ekz., en naĝo Japanio ĉiam estis senrivala kadre de Azio. Ĉinio, kiu neniam ĉampioniĝis en la naĝaj

Fama ĉina eksgimnasto Li Ning donas premion al ĉina gimnastino Chen Cuiting. Foto de **HE YANGUANG**



konkursoj de la antaŭaj aziaj sportkunvenoj, gajnis 3 orajn medalojn en la 9-a Azia Sportkunveno, 10 orajn medalojn en la 10-a kaj 23 orajn medalojn en la 11-a. La unuan lokon de la mondo en 1990 okupis ĉinaj naĝistinoj Zhuang Yong, Lin Li kaj Wang Xiaohong laŭ la atingoj en 100-metra rapid-naĝo, 200-metra miksnaĝo kaj 100-metra papili-naĝo respektive. Mondajn nivelojn atingis ankaŭ iuj aliaj ĉinaj naĝistoj.

Ĉinaj luktistoj kaj boksistoj unuafoje gajnis orajn medalojn en la ĉi-foja sportkunveno, i.a., ĉinaj boksistoj gajnis ankaŭ 5 arĝentajn medalojn. Ĉina mongol-nacia luktisto Baoyu, kvankam vundita je kruro, luktis kun eminenta irana luktisto Naderi Seyed Mohamad, venkis lin per 2:0 kaj gajnis la oran medalon por klasik-stila lukto en kategorio de 100 kg.

La Ĉina Vira Flugpilka Teamo bele ludis kun la sud-korea rivalo, tamen malfacile gajnis la ludon. En la lastaj jaroj malnovaj membroj unu post alia forlasis la Ĉinan Viran Flugpilkan Teamon kaj venis al ĝi novicoj, ke ĝi perdis ludojn pli ol ĝi gajnis en la pasintaj 4 jaroj. Ĝi ludis 6-foje kun la japana rivalo kaj malvenkis 6-foje. Ĉi-foje ĝi ĉampioniĝis, dank' al la unuanimeco kaj nefleksebleco de siaj membroj, tial oni nomas ĝin gajninto de la plej "peza" ora medalo.

Kun multaj oraj medaloj Ĉinio tamen ankoraŭ devas iri longan kaj malglatan vojon, ĉar la sportkunveno montras, ke nemalmultaj sportobranĉoj, kiel piedpilko kaj hokeo, ankoraŭ estas malfortaj por Ĉinio, kaj iuj fortaj sportobranĉoj, kiel virina korbopilko kaj vira tabloteniso, jam perdis sian superecon. Gajni ĉampionecon estas facile, kaj teni ĝin malfacile. Kaj plie, en multaj sportobranĉoj Ĉinio estas malproksima de la mondaj niveloj. Tio postulas, ke la ĉinaj sportistoj ne ŝparu tempon kaj forton por kuratingi. (**Zhang Qingzhen**)

# La sporto de Azio en progreso

EN la 16-taga konkurso aziaj sportistoj atingis elstarajn sukcesojn. Ili 7-foje novigis mondajn rekordojn, 89-foje rompis aziajn rekordojn kaj 189-foje rompis rekordojn de aziaj sportkunvenoj. La fizionomio de la azia sporto evidente ŝanĝiĝis post la sportkunveno. 25 landoj kaj regionoj gajnis medalojn, kies nombro superis tiun en la antaŭaj aziaj sportkunvenoj. Tio montris grandan progreson de malfortaj teamoj kaj disvolviĝon de la azia sporto.

Pro historiaj kaŭzoj la sporta nivelo de Azio estas multe malpli alta ol tiu de la mondo. En la pasintaj jaroj, dank' al oftiĝo de la sporta interŝanĝo en la monda skalo kaj penado de la aziaj landoj, aziaj sportistoj rapidigis siajn paŝojn por kuratingi la mondan nivelon en iuj sportobranĉoj. La 11-a Azia Sportkunveno revuis la ĝeneralan nivelon de la azia sporto. Arkopafo, plonĝo, tabloteniso, volanado kaj aliaj mondnivelaj ludoj estas ankoraŭ fortaj. Naĝo, biciklado k.a. jam proksimiĝis al la monda nivelo. La ĉinaj sportistoj gajnis 3/5 de la oraj medaloj en la 11-a Azia Sportkunveno. Tio ne nur montras, ke Ĉinio estas ĝenerale forta en Azio, sed ankaŭ signifas, ke ĝi, kiel sporte forta azia lando, devos konkuri kun la eŭropaj kaj amerikaj sportaj potencoj.

Vidinte la ĉi-fojan konkurson, oni povas diri, ke la sporto disvolviĝas ne egale en aziaj landoj. Orient-aziaj landoj estas kompare fortaj. Japanio estis la unua potenco en 8 sinsekvaj aziaj sportkunvenoj, sed ĉi-foje ĝi gajnis ne tiom multe da oraj medaloj. Ĝi estis la tria potenco en la lastaj du aziaj sportkunvenoj. La Japana Olimpika Komitato donis grandan atenton al tio. Ĝi decidis ĉiamaniere progresigi sian sporton ekde nun.

La Demokratia Popola Respubliko de Koreio estas forta azia lando en sporto. En la 11-a Azia Sportkunveno ĝi tenis sian superecon en pafo kaj iuj aliaj tradiciaj ludoj kaj krome ĝi jam fariĝis forta rivalo de Ĉinio, Sud-Koreio kaj Japanio en la konkursoj de gimnastiko, tabloteniso kaj plonĝo. Ĝia nivelo leviĝis.

En la Olimpiaj ludoj en Seulo en 1988 Sud-Koreio superis Ĉinion en la nombro de la gajnitaj oraj

medaloj kaj okupis la 4-an lokon en la mondo. La nivelo de la sud-koreaj arkopafistoj estas la plej alta en la mondo. En la 11-a Azia Sportkunveno ili ne nur rompis mondajn rekordojn, sed ankaŭ puŝis arkopafadon al nova nivelo. Bokso estas unu el la fortaj ludoj de Sud-Koreio. Ĉi-foje ĝi gajnis 5 orajn medalojn kaj restis la plej forta en bokso, malgraŭ ke oni jam rompis ĝian monopolon tiuflanke. La sud-koreaj luktistoj estas evidente fortaj, ĉar ili gajnis 7 orajn medalojn. Krome, Sud-Koreio estas forta ankaŭ en manpilko, skermo, kajakado kaj kanuado.

Al la ĉi-foja sportkunveno la sudorient-aziaj landoj sendis elitajn sportistojn. Ĝeneral-dire, ilia sporta nivelo leviĝis. Kvankam iliaj atingoj ne estas brilaj, tamen ilia aktiveco kaj penemo profunde impresis la rigardantojn.

Indonezio kaj Malajzio konataj kiel "landoj de volanado" rapide progresis en la lastaj jaroj. Evidente, ili volas restarigi sian superecon en volanado. En la ludkampo vidiĝis preskaŭ ĉiuj eminentaj volanistoj de la mondo. Tio estas komparebla kun monda ĉampioneca konkurso.

Bokso estas sporto fierinda por la tajlandaj sportistoj, precipe en malpezaj kategorioj. Ili iam atingis bonajn sukcesojn en mondaj konkursoj. Ĉi-foje la Tajlanda Piedpilka Teamo elpuŝis la Ĉinan Piedpilkan Teamon el la antaŭaj kvar lokoj, kio multe levis ilian pozicion en la piedpilkista rondo.

La sud-aziaj landoj gajnis 5 orajn, 12 arĝentajn kaj 23 kuprajn medalojn. El ili Pakistano estis la plej elstara: Ĝi gajnis 4 orajn, 1 arĝentan kaj 7 kuprajn medalojn.

En iuj sportobranĉoj la sud-aziaj sportistoj estas fortaj. Multaj el ili montris sian bonan spiriton. En la konkurso de kabadi-o la sportistoj de Hindio, Pakistano kaj Bangladeŝo gajnis oran, arĝentan kaj kupran medalojn respektive dank' al sia eminenta ludarto kaj obstineco. Kaj la spektantoj ĝuis tiun sporton furorantan en la Suda Azio. Oni kredas, ke la sud-aziaj sportistoj certe atingos novan nivelon, se nur ili dediĉos pli da energio.

En la vira 100-metra vetkuro katara sportisto Mansoor Talal la unua atingis la finon kaj per tio fariĝis la unua gajninto de ora medalo en la sportaj delegacioj de okcident-aziaj landoj.

La sporta afero startis kompare malfrue en okcident-aziaj landoj. Pluraj el ili aliĝis al la Azia Olimpika Konsilio antaŭ nelonge, tamen ili progresis rapide. Kataro estas emirlando sendependiĝinta en septembro 1971. Ĝi partoprenis nur 2-foje aziajn sportkunvenojn. En la ĉi-foja kunveno alia eminenta katara sportisto Sulaiman Mohd gajnis la ĉampionecojn en la vira 1 500-metra vetkuro kaj en la vira 5 000-metra vetkuro. Li estis multe atentata pro siaj du ĉampionecoj en la long- kaj mezlongdistanca vetkuroj.

La piedpilkaj teamoj de okcident-aziaj landoj ja estas fortaj. Saudi-Arabio, Kuvajtio, Kataro kaj la Unuigitaj Arabaj Emirlandoj prenis piedpilkon kiel sian nacian ludon. En la 11-a Azia Sportkunveno la Irana Teamo, kiu fondiĝis antaŭ nur unu jaro, montris sin elstara. Ĝi, plene elvolvinte sian teknikon, venkis la Sud-Korean Teamon, la ĉampionon de la lasta azia sportkunveno, kaj gajnis la oran medalon.

Okcident-aziaj landoj estas kompare fortaj ankaŭ en lukto kaj bokso. Irano gajnis 3 orajn, 5 arĝentajn kaj 5 kuprajn medalojn en lukto. Sirio gajnis 1 oran medalon en bokso kaj 2 kuprajn medalojn en lukto. La sporto de okcident-aziaj landoj ja havas brilan perspektivon. **(Zhang Qingzhen)**

# Buntaj floroj de amikeco

DUM la grandioza 11-a Azia Sportkunveno la rigardantoj ne nur laŭdis diverslandajn sportistojn pro ilia granda penado por altigi la sport-nivelon de Azio, sed ankaŭ komunikis unu al alia kortuŝajn aferojn okazintajn inter ili kaj ĉinaj servantoj.

En la boksa konkurso de kategorio de 57 kg sportisto de Sud-Koreio venkis la indonezian. Sed tuj post la finiĝo de la konkurso la lasta salutis la trejniston de la rivalo, kaj ĉi tiu prenis tukon kaj forviŝis ŝviton de sur lia frunto.

La 17-jara ĉina ĵudistino Jin Xianglan luktis kun la japana eminenta ĵudistino Kobayashi Takako, kiu gajnis la unuan lokon en la tut-pacifika ĉampioneca konkurso en 1989. En la duafoja lukto Jin Xianglan per lerta movo forte faligis la rivalon kaj gajnis la ĉampionecon. Tamen Kobayashi Takako longe kuŝis sur la planko kaj ne povis leviĝi: Ŝia dekstra pojno

estis vundita. Kiam la juĝisto deklaris, ke Jin Xianglan gajnis la ludon, ŝi leviĝis helpate de la alia brako kaj gratulis Jin per profunda riverenco. Kaj poste, ŝi denove sidiĝis. Tiam Jin Xianglan tuj kuris al ŝi kaj atente ŝin levis. Subtenate de Jin, ŝi eliris el la luktejo. Tiam leviĝis tondra aplaŭdado por la amikeco pli valora ol ora medalo.

Foje sur pafejo pluvis. La diverslandaj sportistoj devis sin ŝirmi kontraŭ la pluvo. Ili triope aŭ kvarope interpuŝiĝis sub ombrelo, gaje ŝercante, ke tio estas "Unuiĝintaj Nacioj sub ombrelo". Rimarkinte, ke la lipoj de tajlandaj sportistoj paliĝis de malvarmo, du japanaj koleginoj donis al ili pecojn da ĉokolado, kaj ĉi tiuj donacis al la japanaj sportistinoj belajn insignojn. Amika rido varmigis ilian koron.

Kiel gastigantoj, ĉinaj laborantoj faris ĉion eblan por krei plej bonajn kondiĉojn por la konkursoj. En velad-konkursejo de Qinhuangdao transrakontiĝis kortuŝa okazaĵo inter Zakaullah Mohammad kaj ĉina kuracisto Ni Jinghuai. Zakaullah estas eminenta jaktisto de Pakistano. Li kaj liaj kamaradoj gajnis la ĉampionecon de la jakta konkurso de la 10-a Azia Sportkunveno. Sed en la Azia Jakta Ĉampioneca Konkurso de 1989 ili estis venkitaj de indoneziaj sportistoj. Li ĵuris gajni la oran medalon en la 11-a Azia Sportkunveno. Sed, nelonge post sia alveno al Pekino, li estis tordvundita je la lumbo kaj ne povis fari ekzercadon. La maltrankvilega Zakaullah devis peti helpon de ostokuracisto Ni Jinghuai de la Unua Popola Hospitalo de la urbo.

Kuracisto Ni masaĝis lin 20 minutojn, kaj Zakaullah jam eksentis sin bone kaj komencis ekzercadon posttagmeze de la tago. Post tio Zakaullah ĉiumatene venis al la kuracisto por masaĝo. Dank' al masaĝo de la kuracisto, li sukcesis partopreni en la konkurso kaj gajnis la ĉampionecon.

Kiam li ricevis la medalon, li tuj iris al kuracisto Ni kaj diris al li kun emociiĝo: "Ankaŭ ni al vi ŝuldas nian sukceson."

Por prepari bongustajn manĝaĵojn al la 6 000 sportistoj kaj trejnistoj, la administrantoj de la Vilaĝo de Aziaj Sportistoj faris grandan klopodon. La menuo enhavis 600 malsamajn pladojn. En la kuirejoj laboris 504 kuiristoj el famaj hoteloj de Pekino. En la restoracioj entuziasme servis 4 700 kelneroj el hoteloj kaj lernantoj de profesiaj kaj turismaj kolegioj. Ĉiutage sportistoj havis malsamajn menuojn, kaj ili diris kun granda bedaŭro, ke ili ne povos gustumi ĉiujn 600 pladojn.

Por islamanoj oni speciale funkciigis restoracion, kiu estis la plej granda el tiaj restoracioj de ĉiuj antaŭaj aziaj sportkunvenoj. Ĉiuj kuiristoj de la restoracio estis huj-nacianoj (islama nacio de Ĉinio) kaj imamo servis kiel buĉisto. Kiam vicprezidento de Irano vizitis la vilaĝon kaj trovis, ke la iranaj sportistoj kun plezuro ĝuas la manĝon en la restoracio, li montris kontentan rideton.

Kiam sportistoj kaj trejnistoj havis sian naskiĝtagon dum la sportkunveno, servantoj prezentis al ili delikatan torton.

Por ke la sportistoj povu bone ripozi kaj amuziĝi, oni aranĝis por ili multajn interesajn distraĵojn. Ekzemple viziti la Sanigan kaj Amuzan Palacon, la faman Domon de Princo Gong, la Grandan Muron... Iuj diris, ke la interesegaj distraĵoj estas neimageblaj.

(**Sun Guoliang**)

# Medal-gajnintoj

| Lando (Regiono) | Ora(j) medalo(j) | Arĝenta(j) medalo(j) | Kupra(j) medalo(j) | Totala nombro |
|---|---|---|---|---|
| Ĉinio | 183 | 107 | 51 | 341 |
| Sud-Koreio | 54 | 54 | 73 | 181 |
| Japanio | 38 | 60 | 76 | 174 |
| DPRKoreio | 12 | 31 | 39 | 82 |
| Irano | 4 | 6 | 8 | 18 |
| Pakistano | 4 | 1 | 7 | 12 |
| Indonezio | 3 | 6 | 21 | 30 |
| Kataro | 3 | 2 | 1 | 6 |
| Tajlando | 2 | 7 | 8 | 17 |
| Malajzio | 2 | 2 | 4 | 8 |
| Hindio | 1 | 8 | 14 | 23 |
| Mongolio | 1 | 7 | 9 | 17 |
| Filipinoj | 1 | 2 | 7 | 10 |
| Sirio | 1 | 0 | 2 | 3 |
| Omano | 1 | 0 | 0 | 1 |
| Taibei | 0 | 10 | 21 | 31 |
| Hongkong | 0 | 2 | 5 | 7 |
| Sri-Lankao | 0 | 2 | 1 | 3 |
| Singapuro | 0 | 1 | 4 | 5 |
| Bangladeŝo | 0 | 1 | 0 | 1 |
| Birmo | 0 | 0 | 2 | 2 |
| Laoso | 0 | 0 | 1 | 1 |
| Aomen | 0 | 0 | 1 | 1 |
| Nepalo | 0 | 0 | 1 | 1 |
| Saudi-Arabio | 0 | 0 | 1 | 1 |
| Totala nombro | **310** | 309 | 357 | 976 |

ZHENG ZHENJIE:

# Hidrologiaj stacioj ĉe Yangzi-rivero

KVANKAM la totala areo de la baseno de Yangzi-rivero konsistigas 18.75% de tiu de Ĉinio, tamen ĝia totala jara produktovaloro de industrio kaj agrikulturo jam superas 400 miliardojn da juanoj, kiuj konsistigas ĉ. 40% de tiu de la tuta lando. Kiam formiĝas la ekonomia koridoro de la baseno de Yangzi-rivero, en- kaj eksterlandaj personoj multe interesiĝas pri la sinteza ekspluato kaj utiligo de la akvoenergio de la rivero kaj pri rimedoj kontraŭ inundo.

En julio de la kuranta jaro, mi vojaĝis 2 000 kilometrojn kaj vizitis laborantojn de pli ol 10 hidrologiaj stacioj sub la hidrologia buroo de la Akvoutiliga Komisiono de Yangzi-rivero. Mia vojaĝo komenciĝis de la hidrologia stacio Pingshan ĉe Jinsha-rivero, branĉo de Yangzi-rivero, kaj finiĝis ĉe la eksperimenta stacio Hechuang apud Jingjiang-rivero simila al zigzaga intesto. La laborantoj estis nur malgranda parto de la pli ol 3 000 hidrologoj, nomataj "okuloj" por Yangzi-rivero.

## LA CUNTAN-A HIDROLOGIA STACIO

La Cuntan-a Hidrologia Stacio distancas je 7.5 kilometroj de la urbo Chongqing. En la stacio laboras nur 28 homoj. Ĝi havas malnovajn oficejojn, dormoĉambrojn kaj maŝinejon, akvogaŭĝon starantan ĉe la bordo de Yangzi-rivero, akvonivelo-registran testilon, aeran kablon por mezuri la rapidecon kaj kvanton de akvofluo kaj ŝipojn por mezuri sablokvanton kaj akvokvaliton. Tamen, laŭ la administra principo difinita de la akvoutiliga komisiono, la areo, administrata de la Cuntan-a Hidrologia Stacio, estas 867 000 kvadrataj kilometroj.

La Cuntan-a Hidrologia Stacio estas unu el la stacioj regantaj akvon el la supra Yangzi-rivero. Kiam la flukvanto superas 50 000 kubmetrojn ĉiusekunde, la laborantoj de tiu stacio laboras tage kaj nokte por protekti la vivon kaj posedaĵojn de la popolo. Ekz., en julio 1981, kiam la akvonivelo de la rivero en Beibei-distrikto de Chongqing atingis 208.2 metrojn, la Cuntan-a Hidrologia Stacio pli frue je tri tagoj faris prognozon, ke la 220 000 lokanoj kaj posedaĵoj ne suferis de perdo.

Du trionoj de la akvoenergio de Yangzi-rivero konserviĝas en ĝia supra parto. En julio de la kuranta jaro la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio okazigis kunvenon pri starigo de la Tri-gorĝa Akvoutiliga Pivota Konstruo. La kunveno daŭris naŭ tagojn. Se estos starigita la pivota konstruo, kies konservita akvo atingos la alton de 175 metroj laŭ la plano, oni multe profitos de ĝi en produktado de elektro, inundoprevento, navigo k.a. Kvankam ne komenciĝis la konstruado nun, tamen en la 60-aj jaroj laborantoj de hidrologiaj stacioj, kiaj Cuntan-a kaj aliaj, komencis esplori la problemon pri sedimentado de sablo post ekfunkciado de akvobaraĵo kaj faris plurfoje mezuradon kaj analizadon.

## MATERIALO-LIVERO POR KONSTRUI LA BARAĴON

Ĉe la Gezhouba-a Akvoutiliga Pivota Akvobaraĵo fama en Ĉinio sidas la Gezhouba-a Hidrologia Eksperimenta Stacio. Ĝi estis finkonstruita en 1988, kun longo de 2 606.5 metroj mezurita laŭ la akso de la baraĵo, kaj konsistas el unu akvoellasa kluzo, du elektrejoj, tri ŝipkluzoj, du sabloellasaj kluzoj kaj unu konstruaĵo kontraŭ sedimentado. En la elektrejo funkcias 21 generatoroj kun totala kapacito de 2.175 milionoj da kilovattoj. La akvo ellasita el la rezervejo faciligos navigadon sur parto de Chuanjiang-rivero kun longo de 110-200 km. .(Chuanjiang-rivero estas nomo de parta Yangzi-rivero, kiu komenciĝas de Yibin, Sichuan-provinco, kaj finiĝas ĉe Yichang, Hubei-provinco).

Por konstrui tiun gigantan baraĵon necesas ne nur donitaĵoj pri plej altaj akvoniveloj de Yangzi-rivero en la pasintaj jaroj, sed ankaŭ tiuj pri la plej malaltaj. Surbaze de tio, oni povas determini la altecon de la baraĵo, rezervan kapaciton, irigacian areon kaj generatoran kapaciton. Krome, oni devas bone scii ankaŭ la kvanton de sablo kaj leĝon de la fluado, por alpreni sabloellasan rimedon kaj fari la baraĵon longe ekzistanta. Plejparto de la donitaĵoj estas liverita de la laborantoj de la Gezhouba-a Hidrologia Eksperimenta Stacio.

La laborantoj de tiu stacio tutjare laboras en mizera loko kaj sur hidrologiaj mezurŝipoj. Ili vi-

vas monotonan vivon. Ĝenerale, ne eblas por ili manĝi legomojn, legi ĵurnalon kaj eĉ ĝui bone televidan programon. Malgraŭ tio, ili ankoraŭ sindoneme laboras sur sia posteno.

Dum la konstruado de la akvobaraĵo Gezhouba, veturigante mezurŝipon kun nur 60 ĉevalpovoj, veterana laboranto Su Yonglin faris mezuradon en akvokirlo de Nanjinguan proksime al la baraĵo. Estas tre kompleksa la topografio de tiu regiono, la rivero torentas, kaj minacas gigantaj rifoj kaj kavoj. En iuj lokoj mil-tonelaj pasaĝerŝipoj kaj dekmil-tonelaj varŝipoj devas pasi preter ili. Tamen, la tieaj laborantoj ne estas timigitaj de la danĝero. Foje, iu ŝipo estis envolvita en kirlon kun diametro de 20-30 metroj. Ĝi turniĝis kun rapideco de 9 metroj ĉiusekunde kaj la korpo oblikviĝis. Je la kriza momento Su trankvile ĉesigis la veturadon. Kaptante bonan ŝancon, li plenenergie ekveturigis la ŝipon el la kirlo, tiel ke li savis la ŝipanojn el la danĝero.


Post la ĉesigo de la akvofluo por la baraĵo, por observi la ŝanĝiĝon de la akvonivelo dekstre de la akso de la baraĵo, mezuristo Liu Rende tri tagojn kaj tri noktojn persistis en laboro ĉe la akvogaŭĝo, eĉ ne povis flegi sian akuŝontan edzinon. Post la ĉesigo li kun sia edzino, kiu okupiĝas ankaŭ per hidrologia laboro, observis la akvonivelon ĉe la elektrejo. Ĉiutage ili observis meznombre 12 fojojn. Kiam okazis inundo, ili devis observi la ŝanĝiĝon de la akvonivelo kaj raportis la donitaĵojn unufoje duonhore. En la komenca periodo de la baraĵa konstruado, la maŝinoj sur la konstruejo bruegis kaj sendormigis, tamen ili daŭrigis sian laboron en fragmitaj budoj.

## FORIGO DE DANĜERO

La parto de Yangzi-rivero, kiu fluas de Zhicheng de Hubei-provinco ĝis Chenglingji de Hunan-provinco, trapasas la antikvan regionon Jingzhou kaj estas nomata Jingjiang-rivero. Ĝi trafluas Jianghan-ebenaĵon kaj Dongting-lagon kaj havas aluvian riverujon. Muĝante tra la gorĝoj de sia supra parto, Yangzi-rivero torentas abrupte al ebenaĵo, kaj la fluo tuj fariĝas milda. Pro la longtempa sedimentado de sablo en Jingjiang-riverujo portita de la fluo el la supra parto, la surfaco de la rivero estas pli alta ol la tersurfaco ambaŭflanke de ĝi kaj aperis la sceno, ke "ŝipoj veturas kvazaŭ super la domoj, dum homoj iras ŝajne sub la rivero". Kiam venis inundo, ĝi estis barita ekskluzive de la ambaŭbordaj grandaj digoj. La granda Jingjiang-digo norde de Yangzi-rivero estas pli alta je 10 metroj ol la tersurfaco, kaj la mak-



Laborantoj de la hidrologia stacio Hanjiang



Preno de specimeno de akvo kun sablo el Yangzi-rivero

El Popola Ĉinio 12 (387) 1990
MONATA GAZETO ELDONATA DE ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. KESTO 77, BEIJING, ĈINIO

# ENHAVO

2 **La 11-a Azia Sportkunveno**
16 **Hidrologiaj stacioj ĉe Yangzi-rivero**
19 Trajtoj de la disvolviĝa tendenco de la monda ekonomio en la 90-aj jaroj
30 **Ĉinio en la Internacia Senanalfabetiga Jaro**
48 **Alilandaj studentoj en la Pekina Universitato**
27 POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO: Pri "Umefloroj"
52 SCENEJO KAJ EKRANO: Filmado sur malnovaj vojoj de la Flava Rivero
32 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (19): Fama kultura urbo Dali
22 FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO: For la falsajn kaj fikvalitajn komercaĵojn
24 Festo de la vinbera urbo
42 AMUZOJ: Ĉina ŝako (XII)
41 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio" (Pantuneto)
38 Mia volontulado en la Centra Oficejo de UEA
40 MI KAJ ĈINIO: Miaj tri kontaktoj kun Ĉinio
Ĉinio allogas min
37 ESP-NOVAĴOJ
43 POR KOMENCANTOJ: Kompleza nekonato en vojaĝo
20 INTER NI
44 KURANTAJ AFEROJ
SUR LA KOVRILO: La Pekina Laborista Stadiono, la ĉefa konkursejo de la 11-a Azia Sportkunveno
21 Kamionado de varoj al vilaĝoj
46 Ĝardenoj de Yangzhou
SUR LA DORSKOVRILO: Prezentado de sportistoj

Fotoj de LIU SI-GONG

simuma alto jam atingas 16 metrojn. Se breĉiĝos la digo, la fluo sin ĵetos al Jianghan-ebenaĵo de la loko alta je dekkelkaj metroj. Kia danĝero! Kiel oni diras, "tre longa estas Yangzi-rivero, tamen ĝia danĝera parto estas Jingjiang-rivero". En la historio multfoje okazis, ke en tago estis riĉa rikolto, sed en nokto la loko fariĝis akva mondo.

Por forigi la gravan danĝeron en Jingjiang-rivero, en 1952 oni starigis la Jingjiang-an Akvomastruman Konstruon, por konduki la akvon, kiun la rivero ne povas enteni, en aliajn riverojn, lagojn kaj kampojn. Ĝi kovras areon de 920 kvadrataj kilometroj, havas akvoenkondukan kluzon longan je 1 054 metroj kaj povas enteni en si 6 miliardojn da kubmetroj da akvo. Luktante kun inundo, la laborantoj de la eksperimenta stacio Hechuang ĉe Jingjiang-rivero klopodis por kolekti, reordigi kaj analizi hidrologiajn materialojn pri Jingjiang-riverujo.

Julie de 1987, la akvonivelo ĉe Shashi en la baseno de Jingjiang-rivero atingis 44.47 metrojn kaj proksimiĝis al la inunddivida nivelo de 44.49 metroj. Tiam ankoraŭ pluvis. Ĉu necesos dividi la inundon de la rivero? Tio koncernis 540 000 hektarojn da tero kaj la vivon kaj posedaĵojn de kvin milionoj da loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo. Post serioza mezurado la laborantoj de la eksperimenta stacio sendis la donitaĵojn pri akvonivelo kaj proponon ne fari akvokondukon rekte al la Centra Kontraŭinunda Komandejo. La diferenco inter la akvonivelo de la okazinta inundo kaj tiu prognozita de ili estis nur 0.01 metro. Tio montris, ke ĝustaj estas iliaj mezuro kaj propono, tiel ke evitiĝis granda perdo kaŭzita eventuale de la inundo.

Nun, farante mezuradon, tiu eksperimenta stacio aplikis avangardan telesendan teknikon, formiĝis kompleta sistemo pri observado de inundo kaj la tekniko de koncerna prognozo enviciĝis inter la avangardaj teknikoj de la mondo.

De 1987 ĝis 1989, en la basenoj de Jingjiang-rivero kaj Dongting-lago oni faris aviadan telesentan observadon per televida filmado kaj kolora infraruĝa fotado en malsamaj direktoj. Kaj tiamaniere oni sukcesis en la eksperimento pri apliko de kontraŭinunda telesento. Vidinte bildojn pri inundo kaj akirinte akvonivelajn donitaĵojn, la koncernaj departementoj povas sin turni rekte al la informdona sistemo pri inundo, por scii la inundan sferon, ekonomian perdon k.a.

Je la finiĝo de mia vizito laborantoj de la stacio diris al mi, ke en Ĉinio estas nur malmultaj hidrologiaj stacioj, kiuj aplikas tiun avangardan teknikon. Ankoraŭ postiĝintaj estas la ekipaĵoj de plejparto de la hidrologiaj stacioj. Krome, estas portempa la metodo dividi inundon. El longtempa vidpunkto, por radikale forigi la minacon de inundo oni devas fari nenion alian ol starigi la Tri-gorĝan Akvoutiligan Pivotan Konstruon kun alta akvonivelo. ■

XUE JINGXIAO:

# Trajtoj de la disvolviĝa tendenco de la monda ekonomio en la 90-aj jaroj

POST la ekonomia stagnado en la 70-aj jaroj kaj la komenca periodo de la 80-aj jaroj, la ekonomio de la Okcidento depost 1983 suriris la vojon de malalta, sed stabila kaj daŭra kreskado. En la 90-aj jaroj la ekonomio de la Okcidento eble rapide disvolviĝos en malfacileco, sed la ŝanco kaj provoko ne estos samaj por ĉiuj landoj. En la 90-aj jaroj ĝi havos jenajn trajtojn:

1. La nova scienc-teknika revolucio pliigos la ekonomian kreskadon kaj aperos nova leviĝo en la monda skalo

La enhavo de nova scienc-teknika revolucio estas revolucioj de informo, materialo kaj bioinĝenierio. Ilia kerno estas informoj. Jam komenciĝis tiu revolucio. Oni antaŭdiras, ke eble realiĝos la praktika uzo de superkondukta materialo en 1993-1994, aŭtomata kontaktiĝo de diversaj komunikaj retoj en 1996-1997, efika kuraco de aideso en 1997, kono de la strukturo de ĉela kanceriĝo kaj akiro de novaj plantoj pere de ĉela kuniĝo en 1998, ekspluato de marfundaj riĉaĵoj, posedo de akvo-puriga tekniko por lagoj kaj riveroj en 1999. En ĉ. 2000 realiĝos prognozo de kot-ŝtona fluo de pluvego, aperos materialoj por artefaritaj visceroj kaj novaj plantoj faritaj pere de genetikaj faktoroj... En la 21-a jarcento pompe floros la nova scienc-teknika revolucio. Evidente, en la posta periodo de la 90-aj jaroj komenciĝos la alta tajdo de nova scienc-teknika revolucio.

La alta tajdo de la nova revolucio certe estigos grandajn ŝanĝiĝojn en la socia ekonomio kaj produktado kaj vivmaniero de la tuta socio. Puŝate de la revolucio, espereble aperos bona tendenco de la ekonomia kreskado. Pro tio, la ekonomia kreskado en la 90-aj jaroj estos pli alta ol tiu en la 80-aj jaroj.

La monda politika situacio havas intiman rilaton kun la monda ekonomio. Iuj opinias, ke la monda politika situacio de la 90-aj jaroj estos pli malkvieta kaj pli malstabila, tial ili estas maltrankvilaj, ke tio malhelpos la kreskadon de la monda ekonomio. Aliaj opinias, ke la monda politika situacio de la 90-aj jaroj estos necertigebla, sed laŭ la nuna stato ĝia ĝenerala malstreĉiĝa tendenco estos ankoraŭ neŝanĝita. Se ne aperos granda politika evento influanta la tutan terglobon, estos ne ŝanĝita la supre analizita ekonomia tendenco.

2. Kompleta formiĝo de la tri ekonomiaj regionoj de okcidentaj landoj.

En la 70-aj jaroj oni jam parolis pri la tri okcidentaj ekonomiaj regionoj, t.e. Usono, la Okcidenta Eŭropo kaj Japanio. El ili nur la Okcidenta Eŭropo praktikas blokan ekonomion.

En la posta periodo de la 80-aj jaroj, unu el la evidentaj trajtoj de la struktura ŝanĝiĝo de la monda ekonomio estas plirapidiĝo de la regiona ekonomia blokiĝo. La 90-aj jaroj estos la ŝlosila periodo por kompleta formiĝo de antagonisma strukturo de bloka ekonomio: En 1992 aperos granda eŭropa merkato, poste perfektiĝos ĝia integreco; en la 90-aj jaroj komenciĝos la formiĝo de Uson-Kanada Libera Komerca Regiono kaj formiĝos orient-azia ekonomia sfero, kiu inkluzivos ĉefe Japanion, "kvar malgrandajn" (la sudan Koreion, Singapuron, Taiwan kaj Hongkongon), la landojn de la Asocio de Sudorient-aziaj Nacioj (ASOAN). Kvankam estas ne certe, ke ASOAN estos bloko same kiel tiu de la Okcidenta Eŭropo, tamen plifortiĝos la reciprokaj kontaktiĝo kaj kunlaboro en tiu ĉi regiono.

Grava faktoro akceli formiĝon de la Orient-azia Ekonomia Sfero estas trapeza industria strukturo de tiu regiono. Nun, Japanio, la "kvar malgrandaj" kaj ASOAN ĝuste formas industrian transmisian vicon. Pro disvolviĝo de nova scienc-teknika revolucio kaj ŝanĝiĝo de aliaj internaciaj ekonomiaj rilatoj, Japanio transigas al la "kvar malgrandaj" parton da industrioj kapitale densigitaj, teknike altaj kaj laborule koncentritaj, kaj la "kvar malgrandaj" transigas al la landoj de ASOAN parton da ili. Tio formis trapezan dislokiĝon de industria strukturo kaj la tiean internacian ekonomian

kunlaboron. Tiu kunlaboro havas evidentan reciproke kompletigan trajton, kies utilo, sub certaj kondiĉoj, superas tiun de la konkurencò. Tial ĝi ne nur fariĝis puŝa forto por formiĝo de la Orient-azia Ekonomia Sfero, sed ankaŭ estas grava kaŭzo, ke ekde la 80-aj jaroj tiu regiono akiris mirinde rapidan disvolviĝon.

Post la konkurenco de la 90-aj jaroj, la ekonomia forto de la Norda Ameriko en 2000 konsistigos ĉ. 25% de la totala nacia produktovaloro de la mondo; tiu de la nunaj 12 landoj de la Okcident-eŭropa Komunumo 18%; tiu de Japanio, la "kvar malgrandaj" kaj ASOAN 17.5% aŭ pli multe. Tiam la ekonomio de la Okcidento vere havos tri gravajn partojn.

Kun alveno de la alta tajdo de scienc-teknika revolucio, la merkatoj ne nur ludos pli kaj pli gravan rolon en disvolviĝo de multaj landoj, sed ankaŭ fariĝos kerno por blokiĝo de regiona ekonomio. En la 90-aj jaroj, sub la kondiĉoj de ekonomia blokiĝo, unuflanke plifortiĝos komerca protektismo, aliflanke la scienc-teknika revolucio pluapaŝe grandigos la mondan merkaton. La lasta certagrade kompensos la antaŭan. Tiu fenomeno fariĝos pli evidenta en la 21-a jarcento.

La apero de la supre menciitaj tri grandaj ekonomiaj blokoj metos bazon por ekonomia strukturo de la okcidenta mondo en la 21-a jarcento.

**3. Pligrandiĝos la diferenco inter la Sudo kaj Nordo.**

Laŭ raporto de la Monda Banko, en 1965 la totala nacia produktovaloro de la okcidentaj evoluintaj landoj estis 7.95-oble pli multe ol tiu de la landoj kun plej malalta enspezo kaj kreskis 15.3-oble en 1987. En tiu periodo la totala nacia produktovaloro de tiuj plej subevoluintaj landoj kreskis 3.86-oble, dum tiu de la okcidentaj evoluintaj landoj 7.89-oble. Evidente, la diferenco inter la Sudo kaj Nordo pligrandiĝis en la pasintaj pli ol 20 jaroj.

En la 90-aj jaroj, sub la kondiĉoj de nova scienc-teknika revolucio, pro malalta grado de eduka ĝeneraligo, granda procentaĵo de analfabetoj, malforta kapablo por scienc-teknikaj esploro kaj aplikado kaj por disvastigi la plej novajn sciencojn kaj teknikojn, la aplikado de novaj sciencoj kaj teknikoj far subevoluintaj landoj por rapidigi la ekonomian disvolviĝon estos relative malrapida kompare kun tiu de la evoluintaj landoj. Kaj plie, la malfacile regata kreskado de la loĝantaro en subevoluintaj landoj faris la problemon pli serioza.

En la 90-aj jaroj la problemoj pri greno, ŝuldoj, inflacio ktp. daŭre malhelpos la disvolviĝon de la subevoluintaj landoj.

La pligrandiĝo de la diferenco inter la Sudo kaj Nordo siaflanke katenos la disvolviĝon de la evoluintaj landoj en merkato kaj aliaj. Pro tio solvi la problemon pri la ekonomia disvolviĝo de la subevoluintaj landoj estas grava afero por la tuta mondo en la 90-aj jaroj.

Rezulte de la supre menciitaj gravaj trajtoj, en la 90-aj jaroj, precipe post la meza periodo de la 90-aj jaroj, denove rapide disvastiĝos la internacia transmisia tajdo de industria strukturo kaj nova alta tajdo de investado. ■

---

## INTER NI

*En majo 1990 s-ro Nagaoka Ziro, leganto de "El Popola Ĉinio", partoprenis festadon de la 40-jara jubileo de nia revuo kaj faris turisman vojaĝon en Ĉinio. Reveninte sian hejmlandon, li skribis al ni la artikolon "EPĈ kaj Mi". Ni publikigas ĝin sube en mallongigo.*

**La Red.**

Mi estas japano 66-jara, esperantisto de 35 jaroj. En 1978, nome antaŭ 12 jaroj, por la unua fojo mi vizitis vian landon, kiel membro de la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPĈ-Amikoj kun s-ro Tokuda Rokuro kiel estro kaj s-ro Umeda Yosimi kiel sekretario. Do ĉi tiu vizito estas la duafoja.

Parolante pri via ŝatata gazeto "El Popola Ĉinio", mi estas ties abonanto de 32 jaroj. En mia biblioteko konserviĝas preskaŭ ĉiuj numeroj de ĝi post 1958, inkluzive de la specimena numero de la reviviĝinta EPĈ, kiu aperis en 1957 post sia kvarjara silentado.

Retrorigardante la pasintajn 32 jarojn, mi sentas, ke la gazeto sufiĉe bone tenadis sian karakteron deklaritan ĉe la restariĝo, nur escepte de numeroj el la "dekjara malfacilega periodo".

Se temas pri la artikoloj el la numeroj de 1989, plej multe interesis min la serio da artikoloj "Libera Forumo de Eminentaj E-istoj". Ankaŭ artikoloj traktantaj la polucion de medio estis legindaj. Sendube la mediprotektado estas unu el la plej gravaj aktualaj problemoj, kontraŭ kiuj ni nun staras. Aliflanke, legi la raporton pri la analfabeteco de ĉinaj infanoj estis por mi eĉ ŝoko.

Fine mi permesas min konfesi, ke ne plaĉas al mi tia raportaĵo, en kia oni informas, kvazaŭ ĉio en Ĉinio bonege iradus nuntempe.

Ĉiuokaze neniu dubas, ke EPĈ estas la plej impona periodaĵo en la mondo Esperanta kaj Ĉinio estas unu el la plej gravaj landoj en Esperantujo.

**NAGAOKA ZIRÔ** (Japanio)




Klientoj



Vendado sur kamiono

Infanoj ĝuas bongustajn bombonojn.



# Kamionado de varoj al vilaĝoj

de **LING YOUJUAN**

Komence de ĉi somero kamionoj de la Malpez-industria Buroo de Tianjin veturis kun ĉiutagaj bezonaĵoj al la montregiono Taihang, kie trafiko estas malfacila. Kien venis la kamionoj, tie oni starigis provizorajn budojn. Vilaĝanoj aĉetis aluminiajn potojn kaj kruĉojn kaj iu kamparana familio aĉetis tri biciklojn kun marko Feige. Ili ĝojis, ke ili povis aĉeti en sia vilaĝo tiel malmultekostajn kaj bonkvalitajn varojn. La kamionado faciligis aĉetadon kaj konadon de granda latenta forto de la ĉina kampara merkato.

# For la falsajn kaj fikvalitajn komercaĵojn

de **DU TIAN**

FALSAJ kaj fikvalitaj komercaĵoj senescepte vekas indignon en la socio. Nun en Ĉinio, kie la komercaĵa ekonomio ĵus komencis disvolviĝi kaj la koncernaj leĝoj ankoraŭ ne estis perfektigitaj, la falsaj kaj fikvalitaj kune kun la bonkvalitaj komercaĵoj penetris en ĉiujn angulojn de la socio. Samtempe kun tio, ili ankaŭ dronis en pli kaj pli malfacila situacio.

## KONSCIENCO DE VENDEJOJ

Ĉe la komenco de la kuranta jaro malfermiĝis en Nankino-strato, la plej prospera komerca strato en Ŝanhajo, tia montrofenestro: Sub tri grandaj helruĝaj krisignoj montriĝis ordinaraj ĉemizoj, ĵerzoj, ledŝuoj, konfitaĵoj, elektraj aparatoj k.a.

La montrado malkaŝis, ke la kardita ĵerzo el "ankara lano" en la prezo de 142 juanoj (meznombra monata enspezo por ordinara salajrulo) fakte estas el ordinara lano; la moda ĵerzo el "pura lano" fakte entenas nur 1.29% da ŝaflano; la aŭtomata aerŝaltilo kun marko de iu ŝanhaja fabriko de elektraj aparatoj fakte estas fikvalita imitaĵo de alia loko; la kvanto de kolorigilo en pruna konfitaĵo superis la permesitan kvanton je 12 obloj...

La rigardantoj estis kaptitaj de ekscitiĝo kaj indigno kontraŭ tiuj profitemuloj, kiuj produktas falsaĵojn.

Tio estas faceto de la cirkulado de komercaĵoj de Ĉinio. Ĝi montras ege seriozan kaj urĝan problemon en tiu kampo: Diversaj kontraŭleĝaj agoj en produktado kaj vendado de komercaĵoj serioze damaĝas interesojn de la konsumantoj, kaj neeviteble leviĝas batalo kontraŭ falsaj kaj fikvalitaj komercaĵoj por protekti interesojn de la konsumantoj.

## VOĈOJ DE KONSUMANTOJ

Laŭ statistiko la Ĉina Asocio de Konsumantoj kaj tiaj asocioj de 24 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj ricevis en la unua duonjaro de 1990 134 788 akuzojn pri fikvalito, trompa reklamo, falsaĵoj kaj malĝusta mezurado de komercaĵoj, je 54 786 pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1989. Inter tiuj akuzoj la plendoj pro ŝuoj, manĝaĵoj, vestoj kaj servoj pli multiĝis ol antaŭe. Atentiginda estas, ke tio estas nekompleta statistiko, ĉar multaj ne akuzis, kvankam ili aĉetis fikvalitajn komercaĵojn.

Junie de la kuranta jaro la Konsumanta Komisiono de la Ĉina Kvalita Asocio raportis la rezulton de sia enketo inter mezaĝuloj, maljunuloj, virinoj kaj infanoj farita de 36 dependaj stacioj en marto kaj aprilo ĉijare. La raporto montris, krom ŝatataj kaj bonvenaj produktaĵoj por la konsumantoj, ĉefe ilian malkontenton. Ekz. malstabileco de koloroj de koloraj televidiloj, ofta difektiĝo de pecoj de diktafonoj, ofta brulo de gasolina forno, fikvaliteco de fridujoj sen garantio de riparservo, mallaŭdinda kvalito de infanaj ludiloj ktp.

Ŝuoj estas unu el la komercaĵoj plej multe plendataj. Ĉu ledŝuoj kaj neĝoŝuoj, ĉu vojaĝŝuoj kaj sportŝuoj, plejparto de ili ne surhavas etiketon de fabriknomo, adreso kaj kvalit-atesto. Teruraj estas iliaj altaj prezoj kaj mallongega uzateco. Iuj paroj da fikvalitaj ŝuoj prezas ĉ. cent juanojn. Uzite kelke da horoj aŭ maksimume kelke da tagoj ili difektiĝis pro defalo aŭ rompiĝo de la plandumoj.

Probable iuj ne povis kompreni, kial tiel multe da falsaj kaj fikvalitaj komercaĵoj sukcesis torenti en la ĉinan merkaton, kiu restis dum longa tempo kvieta kaj stabila. Tion kaŭzis multaj faktoroj. Unu el ili estas, ke iuj produktantoj kaj ofertantoj avide ĉasantaj nur profitojn neglektis, ke en Ĉinio la reforma kaj pordmalferma politiko, disvolvo de la socialisma komercaĵa ekonomio surbaze de la publika posedsistemo kaj disvolvo de produktiveco celas pli bone plenumi la ĉiam kreskantajn bezonojn de la

popolanoj pri materia kaj kultura vivo. Ili eĉ spitis reglamenton de la ŝtato kaj produktas kaj ofertas falsajn kaj fikvalitajn komercaĵojn. Iuj entreprenoj, gajninte la ateston de bonkvalitaj produktaĵoj, malatentis pri la kvalito, kaj kvalito de iuj produktaĵoj de tradiciaj kaj famaj fabrikmarkoj pli kaj pli malaltiĝas. Iuj aŭdacaj homoj ĉiarimede produktas kaj vendas grandan nombron da falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj, defiante deontologion.

## STREĈA LABORO KONTRAŬ FALSAĴOJ

Senbrida inundo de falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj estas spitema defio al la ĉina socialisma komerco servanta al la vasta konsumantaro. Tiu batalo levis sian kurtenon per akuzoj pri falsaj insekticidoj, semoj, cigaredoj kaj vinoj. La kulpintoj estis punitaj, sed tamen falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj ankoraŭ aperadas.

En somero de 1987 la Ŝtata Malpezindustria Ministerio intencis okazigi tutlandan ekspozicion de falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj, kio vere maltrankviligis nemalmultajn fabrikantojn, kvankam fine ĝi ne sukcesis. En la komenco de 1989 la Ŝtata Teknikokontrola Buroo la unua publikigis en ĵurnaloj liston de fikvalitaj produktaĵoj, kio iagrade kontentigis la popolanojn, skurĝis la fabrikantojn kaj klarionis eliminadon de falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj.

En 1989 la ŝtata teknikokontrola sistemo prenis eliminadon de falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj kiel sian ĉefan laboron, plurfoje faris landskalajn specimenajn ekzamenojn de produktaĵoj kaj komercaĵoj. Precipe post kiam la Ŝtata Konsilantaro publikigis du cirkulerojn pri severa puno al falsaĵoj kaj iliaj fabrikantoj kaj ofertantoj, pli vigliĝis la kontrola laboro en diversaj lokoj. Ekz. jarfine de 1989 Pekino postulis de la fabrikantoj kaj komercantoj mem ekzameni siajn produktaĵojn kaj vendaĵojn ekde 1988. Nur en la Pogranda Foiro de la Urba Legoma Kompanio oni trovis kaj traktis 32 specojn da malboniĝintaj manĝaĵoj de 5 kategorioj, en valoro de 43 500 juanoj.

Iu kontrola grupo en Yongjia-gubernio de Zhejiang-provinco malkovris, ke iu individua komercisto faris reklamojn pri vendo de dekkelkaj fikvalitaj produktaĵoj en ĵurnaloj de Hebei-, Sichuan- kaj Zhejiang-provincoj en la nomo de 6 fabrikoj, kiaj la Gubernia Fabriko de Metalurgia Maŝino kaj Elektroaparato kaj la Distrikta Malpezindustria Administrejo. En du jaroj li ricevis monon sume de 1 590 000 juanoj. En 4 monatoj de la unua duono de la kuranta jaro la grupo en la gubernio, kie oni faris multajn falsajn reklamojn por ĉasi malpuran monon, malkaŝis 251 trompistojn de falsaj reklamoj, inter kiuj 6 estis arestitaj kaj licencoj de 101 komercistoj nuligitaj, kaj tiuj redonis kaj punite pagis 500 000 juanojn.

Ĉar senĉese kreskas problemoj en produktado de manĝaĵoj, ke malboniĝas ilia kvalito kaj enhavo de etiketoj ne estas vera, la akuzoj pri manĝaĵoj en la unua duono de 1990 okazis 14 039 fojojn, je 73% pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1989. Pro tio la ŝtata teknikokontrola administrejo prenis kontrolon de problemoj pri ĝeneralaj etiketoj kiel gravan laboron en eliminado de falsaj kaj fikvalitaj komercaĵoj en 1990.


## SENIGI LA ŜTATAJN MAGAZENOJN JE FALSAJ KAJ FIKVALITAJ PRODUKTAĴOJ

Falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj originas el fabrikoj, tial la ekzameno komenciĝis unue de ili. La produktantoj, nur ĉasantaj profiton kaj neglektantaj kvaliton, estos monpunataj kaj ilia produktado estis ĉesigita. Al tiuj, kiuj ne havas necesajn kondiĉojn sed produktas falsajn kaj fikvalitajn varojn, oni nuligas iliajn licencojn. En majo kaj junio de la kuranta jaro la Ŝanhaja Teknikokontrola Buroo malfermis trejnan kurson por 38 fabrikestroj, kies entreprenoj ne povis produkti bonkvalitajn varojn. La kurso ne nur edukis je deontologio, sed ankaŭ instruis praktikajn teknikojn. Post finiĝo de la kurso, oni ankoraŭ faris ekzamenon al iliaj fabrikoj.

La eliminado de falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj en 1989 turnis sian atenton ankaŭ al vendejoj, ĉar vendantoj estas ponto inter produktantoj kaj konsumantoj. Falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj cirkulas sur merkato ĝuste pro la malforta opono de iuj vendejoj. Utiligante luitajn vendotablojn en ŝtataj vendejoj, iuj fikomercistoj vendas falsajn kaj fikvalitajn produktaĵojn. Iuj vendejoj ne rigore observas la regulojn pri ekzameno de varoj, kaj falsaj kaj fikvalitaj produktaĵoj facile distingeblaj enŝteliĝis en ŝtatajn vendejojn. Tio makulis la reputacion de la ŝtataj vendejoj, kiuj ĉiam estas fidataj de la popolanoj pro siaj bonkvalitaj komercaĵoj. Por solidigi kontroladon al tiuj vendejoj, la Ŝtata Teknikokontrola Buroo publikigis antaŭ nelonge rezulton de la specimenaj ekzamenoj pri kvalito de partoj da komercaĵoj de 30 urboj en 1989, en kiu krom la produktantoj, ankaŭ vendejoj malhonoriĝis antaŭ la publiko.

Kiel gvida forto en la cirkula kampo, la ĉinaj ŝtataj vendejoj ludas ŝlosilan rolon en eliminado de falsaj kaj fikvalitaj komercaĵoj tra la lando. Nun tiu laboro iras sub la definitiva devizo: Elimini falsajn kaj fikvalitajn komercaĵojn el la ŝtataj vendejoj en ĉ. tri jaroj.

Milionoj kaj milionoj da konsumantoj metas grandan esperon sur ilin.




Kamela karavano al la celebrado de la Vinbera Festo

# Festo de la vinbera urbo

Teksto de **HU YUN** Fotoj de **LIU SIGONG**

Vinberoj vendataj al turistoj






Sub vinbera pergolo

TURPAN estas fama vinbera urbo kaj pro tio ĝia turisma servo decidis celebri ekde 1990 la Vinberan Feston en ĉiu aŭgusto. Dank' al tio, la urbo allogas multajn turistojn.

Turpan estas antikva loko, kaj antaŭ 2 000 jaroj ĝi fariĝis grava irejo sur la norda parto de la fama Silka Vojo. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) la delegito de la kortego Zhang Qian trapasis Turpan por viziti okcidentajn landojn. Ankaŭ la erudicia bonzo Xuanzang de Tang-dinastio (618-907) trairis la lokon, kiam li pilgrimis al Hindio por peti budhismajn sutrojn. Kaj cetere, Turpan estis frekventata de kamelaj karavanoj. De la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) Turpan estis unu el la centroj de politiko, ekonomio kaj kulturo de la okcidentaj regionoj. Nun oni ankoraŭ povas vidi la ruinojn de la antikvaj urboj Jiaohe kaj Gaochang, kies skaloj montras la prosperecon de Turpan en la antikveco.

Varmego regas en Turpan, unu el la famaj basenoj de Ĉinio. La lago Aiding en la baseno, malpli alta ol la marnivelo je 154 metroj, estas la plej malalta loko en Ĉinio. Barate de la montoj kaj vastegaj dezertoj ĉirkaŭ Turpan, vaporo ne povas eniri en la basenon, kio faras Turpan "Fajrejo". En

Familio en azenĉaro



Ujgura knabino



la baseno estas la purpure ruĝa Flama Monto. En somero aerondo ruliĝas ĉirkaŭ la monto, kvazaŭ ĝi flamus. En Turpan ankaŭ vento estas varma. Kelkminuta restado sub la suno dolorigas la haŭton.

Sed tamen Turpan estas ankaŭ oazo. Ĝi estas tre grava produktejo de vinberoj de Xinjiang. Nun oni kulturas 11 300 hektarojn da vinberoj, kiuj konsistigas seponon de la totala areo de la kampoj kaj trionon de la vinberaj kampoj de Xinjiang. En Turpan multaj stratoj estas dense ombrataj de vinberaj pergoloj. En ĝi estas loko nomata Vinbera Valo, vidindejo preferata de turistoj. Tie vidiĝas altaj pergoloj. La vinberoj belaj kiel perlo kaj agato ravas la pasantojn. La vinberoj de la valo estas aparte dolĉaj, kaj ĉiuj turistoj neniel preterlasas la ŝancon ilin ĝui. Kia plezuro estas gustumi vinberojn sub pergolo! En Turpan kreskas pluraj specoj da vinberoj, kaj la plej bona el ili estas blanka senkerna vinbero. Tiaj vinberoj, dolĉegaj kaj sukoriĉaj, estas tre taŭgaj por fari sekajn vinberojn. Preskaŭ ĉiu familio en la valo havas lokon por sekigi vinberojn. Sur stratoj estas multe da budoj de sekaj vinberoj. La turistoj tre ŝatas aĉeti sekajn vinberojn por donaci al siaj parencoj kaj amikoj.

Maturiĝo de vinberoj ĝojigas la turpananojn. La gastamaj turpananoj faris bonan preparadon por la Unua Vinbera Festo. Ili malfermis vinberan straton bele ornamitan kaj brile iluminatan. En festaj kostumoj la turpananoj ĝojplene alvenis partopreni en la inaŭguro de la festo.

La inaŭguro havis lokon en la Turpana Stadiono. Alte super la stadiono pendis 4 balonaroj, ĉiu en formo de vinbera grapolo, kun longaj sloganaj rubandoj sube. Kondukate de aŭtomobiloj bele ornamitaj, la paradantaj vicaroj preterpasis la podion. La unua vicaro konsistis el 40 kameloj kondukataj de kamelistoj en vesto de antikvaj komercistoj. La agrabla sonorado de tintiloj rememorigis pri la antikveco. La kantemaj kaj dancemaj junuloj gaje dancis, dum junulinoj prezentis al la gastoj freŝegajn vinberojn. La plej interesa el la vicaroj estis tiu de 200 azenĉaroj veturigataj de lokaj kamparanoj. Azenĉaro servas kiel ĉefa transportilo por kamparanoj de Turpan. En la festo maljunaj kamparanoj veturigis bele ornamitajn ĉarojn kun siaj familianoj kaj korboj da vinberoj. La politiko de reformado kaj pordomalfermo praktikata de Ĉinio multe ŝanĝis la fizionomion de la kamparo de Turpan. Ujgura maljunulo diris al mi kun rideto, ke dank' al la bona politiko de la registaro, pliboniĝis la kamparana vivo.

Subiris la suno. La homoj kolektiĝis sub vinberaj pergoloj por ĝui varieteon aranĝitan speciale por la Vinbera Festo. Iom post iom mildiĝis la varmego kaj ekblovis agrabla venteto. Laŭ la takto de muziko la junulinoj ekdancis kaj de tempo al tempo invitis rigardantojn al danco. Gajeco regis sub la pergoloj.

# SENPAGE ESTI MEMBRO DE UEA

**(senpaga aligo de Aziaj aktivuloj al UEA)**

La afero rilatas nur la Aziajn gesamideanojn loĝantajn en la landoj de tiel nomata B-tarifo de la kotiza tabelo (praktike, ĉiuj landoj en Azio krom Japanujo, Singapuro, Honkongo, Kuvajto, suda Koreujo kaj Israelo).

Se vi loĝas en lando de la B-tarifo kaj volas esti individua membro de UEA, verku artikolon pri unu el la subaj temoj.

1. Kion fari kaj kiel progresigi la Esperantan movadon en Azio?

2. Stato de la movado en viaj urbo, regiono kaj kiel plibonigi tion?

Vian artikolon sendu al So Gilsu, Yangchon P.O Kesto 11, Seoul 158-600, Korea Respubliko.

La limdato estas 31 12 1990.

El la venintaj artikoloj mi elektos 20 kaj aligos ties aŭtorojn al UEA. Ili estos individuaj membroj de UEA ekde la jaro 1991. Post unu jaro ili povos esti delegitoj de UEA; en la lando, kie ekzistas aŭ ĉefdelegito aŭ landa asocio (interkonsente kun ili).

**So Gilsu**

# ALIGI AZIAJN ESPERANTISTOJN AL UEA

Multaj aktivuloj laboras sen sufiĉaj informoj. Unu el bonaj informfontoj estas UEA kun ĝiaj jarlibro (kiun ricevas nur la individuaj membroj) kaj la gazeto Esperanto. Konstanta ligo al UEA per la membreco pli memfidigas la aktivulon.

Jen estas demando: ĉu vi volas helpi al tiuj aktivuloj, kiuj pro simpla monproblemo ne povas esti individuaj membroj de UEA? Se vi volas helpi, donacu monon al la UEA-fondaĵo Wüster kun la indiko Azio.

**So Gilsu**

# Pri "Umefloroj"

de **DI ZI** kaj **LAN SHAN**


*Ĉe murangul' sur branĉoj umefloroj*
*Priridas sole froston en ĉi horo.*
*Mi scias fore, ke ne estas neĝo,*
*Pro sento de diskreta bonodoro.*

de **WANG ANSHI**

Wang Anshi (1021-1086), alinome Jiefu, naskiĝis en Linchuan de Jiangxi-provinco. Kiel ĉefministro dum la regado de imperiestro Shenzong (1067-1085 sur trono) de Song-dinastio (960-1279), li iniciatis politikan reformadon. Rilate la teorion de literaturo, li opiniis, ke literaturo devas servi al politiko. Li verkis multe da poemoj spegulantaj la realan socion. En la antikveco multaj verkis poemojn pri umefloroj. La poemo de Wang Anshi verkita en simpleco figure prikantas la karakterojn de blankaj umefloroj. Ĉe murangulo kelke da umefloroj, blankaj kiel neĝo, plene disvolviĝas en la frosto. Sed la diskreta aromo de la floroj rimarkigas, ke ili ne estas neĝflokoj.

Pentristo Chen Dazhang naskiĝis en 1930 en pentrista-kaligrafa familio. De la infanaĝo li ŝatis pentradon kaj kaligrafadon kaj estis instruita de multaj majstroj, kaj dank' al tio li metis por si solidan bazon de pentrarto. Ekde 1978 li studis metodojn pentri blankajn umeflorojn. Dank' al sia pli-ol-dekjara penado, li kreis novan metodon, kiu entenas la tradician ĉinan "senskizan pentradon" kaj pentradon en eŭropa tuĉmaniero. En la arĝenta lunlumo la blankaj umefloroj plene disvolviĝas en la frosto, la oraj pistiloj radias sveltecon kaj bravecon. La pentraĵo riĉa je nuancoj povas esti kalkulata kiel majstraĵo de la tradicia ĉina pentrarto.

La kaligrafaĵo por la poemo estas farita de s-ro Yang Rujun. La ideogramoj ŝajne estas disaj, sed fakte tre regulaj.



Kaligrafaĵo de Yang Rujun


冷香邀素月
陳大章

# Indekso de EPĈ 1990


## 40-JARA JUBILEO DE "EL POPOLA ĈINIO"

| | Nr. pĝ. |
|---|---|
| Gratuloj kaj bondeziroj | 5.10 |
| Gratulaj leteroj de Andre Albault, Kreŝimir Barkoviĉ kaj Flora Szabo-Felso | 5.10 |
| La 40-jara jubileo de EPĈ havas grandan signifon | 5.11 |
| EPĈ laboras por la interkomprenîgo de la popoloj | 5.11 |
| Dediĉo | 5.11 |
| Mia entuziasmo por Esperanto, mia fervora favoro al Ĉinio | 5.12 |
| Gratulaj pentraĵoj | 5.02 |
| Kiel EPĈ estis lanĉita? | 5.13 |
| Al la esperoplena verdejo | 5.15 |
| Solena festado de la 40-jara jubileo de EPĈ | 9.02 |
| Varma gratulo | 9.14 |
| Por nova alteco en la estonteco | 9.15 |
| Gaja internacia vespero | 9.09 |
| Gratula letero de s-ro Bakin | 9.13 |
| Gratula letero de la estraro de UEA | 9.13 |
| Ankoraŭ longe vivu Esperanto en Ĉinio | 9.15 |
| Je via sano | 9.16 |
| Salutvortoj al "El Popola Ĉinio" | 9.16 |

MI KAJ ĈINIO

| | |
|---|---|
| Bela rememoro | 4.43 |
| Mia bildo pri Ĉinio | 5.16 |
| Leciono | 5.17 |
| Retrospektive al la 40 jaroj de EPĈ | 5.19 |
| Post legado de "EPĈ" | 6.16 |
| Mi kaj EPĈ | 6.17 |
| Efikoplena ĉina kubo el EPĈ | 7.43 |
| En miaj rememoroj mi ĉiam kun sento konservos Ĉinion | 8.42 |
| Dankon al Ĉinio | 10.38 |
| Glora Ĉinio | 10.38 |
| Mi konas Ĉinion per Esperanto | 11.38 |
| Sincera amikeco | 11.38 |
| Miaj tri kontaktoj kun Ĉinio | 12.40 |
| Ĉinio allogas min | 12.40 |
| Ni dankas la kontribuintojn por "Mi kaj Ĉinio" | 6.14 |

## ESPERANTO

| | |
|---|---|
| Al nia rond' vi ĉiam mankos!...(Poemo) | 1.16 |
| Tolstoj kaj Esperanto | 3.18 |
| 25-jara jubileo de la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino | 3.22 |
| Zamenhofa festo en Pekino | 3.21 |
| Pri la ĉina Esperanto-turisma simpozio | 4.42 |
| Esplorvojaĝo tra Azio—konkludoj, planoj... | 6.15 |
| Kubo, gastiganto de la 75-a UK | 6.26 |
| Eroŝenko kaj la ĉina E-movado | 8.19 |
| Esperanto, perilo de internaciaj scienc-teknikaj interŝanĝoj | 9.17 |
| Soleno en Havano | 11.06 |
| Mia volontulado en la Centra Oficejo de UEA | 12.38 |

LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ

| | |
|---|---|
| Vojaĝimpresoj el Japanio | 2.18 |
| Nia dubranĉa kulturo | 7.38 |
| Mia aparta sento | 10.37 |

SUR NIA LIBROBRETO

| | |
|---|---|
| Libro pri historio de Ĉinio | 1.31 |
| Rakontoj konataj de ĉiuj familioj en Ĉinio | 2.48 |
| Manĝu por sano | 3.26 |
| Legu libron "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio" | 4.14 |
| Lukse-rave pri Ĉinio | 8.43 |
| Kolektaĵo amuza kaj pensiga | 9.44 |
| Socihistoria panoramo de Ĉinio | 10.18 |
| Iom da akuzo en amuzo | 11.41 |

POR KOMENCANTOJ

| | |
|---|---|
| Plej bona kuracilo por la kronprinco | 1.43 |
| Sinjoro Segemann | 2.49 |
| Kiu estas la vera posedanto de la silko? | 3.45 |
| Kapablo | |
| "Mi volas vian fingron" | 4.44 |
| "Mi vidis nur oron."; Mevoj; Malavida edzino; Timemulo | 6.40 |
| Miskompreno | 7.35 |
| Plumo | 8.39 |
| Sorto | 9.31 |
| La lasta premiito | 10.26 |
| Estiĝo de vaksa tinkturo | 11.45 |
| Kompleza nekonato en vojaĝo | 12.43 |

## POLITIKO

| | |
|---|---|
| Batalo de Ĉinio kontraŭ pornografia polucio | 1.12 |
| Batalo kontraŭ korupto en Shenyang | 2.16 |
| Kuna partopreno en ŝtataj aferoj | 7.18 |
| Maljunulejo por alilandanoj en Ĉinio | 7.36 |

| | Nr. pĝ. |
|---|---|
| Pri la "Baza Leĝo de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo" | 8.14 |
| "Eminentaj Popolaj Servantoj" | 9.30 |

## EKONOMIO

| | |
|---|---|
| Viglas la tuta urbo | 1.20 |
| "Varma tero" por investantoj | 1.44 |
| Kvar sistemoj de la ĉinaj pladoj | 1.23 |
| Nova provo de la kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino | 2.14 |
| Granda ŝtata entrepreno | 3.10 |
| Ĉinio helpas siajn malriĉajn kamparanojn | 4.15 |
| Ĉinio ĉe prunto-redona kulmino | 4.37 |
| De 158 000 al 60 000 000 tunoj da ŝtalo | 5.20 |
| Sopiro al kampoj | 5.46 |
| Ĉina ekonomio en reguligo | 6.18 |
| Esploristo en la lando de "Nigra Oro" | 7.30 |
| Pekina biero de nova gusto | 7.40 |
| Por vestoj de 1.1 miliardoj da loĝantoj | 8.06 |
| "Urbo" en montaro | 9.20 |
| Por disvolvi Pudong-regionon | 10.13 |
| Transloĝiĝo de 170 000 kamparanoj | 10.16 |
| Konstruado de verda "granda muro" laŭ marbordo | 10.06 |
| La urbo Longyan | 10.21 |
| Nigra trezoro | 11.14 |
| Longkou — urbo ĉe "Ora Marbordo" | 11.10 |
| Brakhorloĝo kun verda stelo | 11.20 |
| Hidrologiaj stacioj ĉe Yangzi-rivero | 12.16 |

## KULTURO, EDUKO KAJ SCIENC-TEKNIKO

| | |
|---|---|
| La unua virino en la "morta zono" | 1.34 |
| Moroj de la antikva tigro-kulturo de Guanzhong | 2.23 |
| Konkologo Xin Qitai | 3.16 |
| "Ora ŝlosilo" por memorado | 3.39 |
| Lernantoj de postlaboraj universitatoj | 4.19 |
| Vizito al Qinghua-universitato | 6.21 |
| Giganta okulo por observi la kosmon | 6.42 |
| La satelito "Azio 1" sukcese lanĉita | 7.06 |
| Nova medicina kontribuo | 7.16 |
| Vizito de la Ekspozicio de Elitaj Historiaj Objektoj de Ĉinio" | 11.48 |
| Ĉinio en la Internacia Senanalfabetiga Jaro | 12.30 |
| Alilandaj studentoj en la Pekina Universitato | 12.48 |

### ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ

| | Nr. pĝ. |
|---|---|
| Filozofo rajdanta sur nigra bovo | 7.13 |
| De fiŝrigardado ĝis sonĝo pri papilio | 9.42 |
| Patrina admono • Sanktulo • Filozofia rezono | 11.43 |

## LITERATURO KAJ ARTO

| | |
|---|---|
| Fruktodona festivalo en Pekino | 1.07 |
| Fotografiaj verkoj | 2.46 |
| Teatra lernejo funkciigata de kamparanoj | 3.23 |
| Pentristaro de Guizhou strebanta al lokaj gustoj | 4.48 |
| Denove en neĝa vintro | 5.25 |
| Turniĝanta lanterno | 5.39 |
| Amatoro de miniaturaj envazaj pejzaĝoj | 6.50 |
| Ĉinaj filmoj en la pasintaj 10 jaroj | 7.09 |
| Hejmo de pentristoj | 8.36 |
| Zhang Jinbiao, pentristo de pando | 8.32 |
| Yang Guanghua kaj liaj pentraĵoj | 9.32 |
| Weifeng-perkutinstrumentaro | 9.50 |
| Pentrado saĝigas la infanojn | 10.40 |
| Kantistina vivo | 11.18 |

### ĈINA LITERATURO

| | |
|---|---|
| Feng Menglong, Ling Mengchu kaj prospero de noveloj en Ming-dinastio | 1.39 |
| Perfidita prostituitino Du Shiniang kaj ŝia trezorujo | 1.41 |
| "Peonia Kiosko" de Tang Xianzu kaj la operoj de la dinastioj Ming kaj Qing | 2.37 |
| Sonĝo | 2.39 |
| Pu Songling kaj lia "Strangaĵoj de Liaozhai" | 3.41 |
| Qingfeng (El la novelaro "Strangaĵoj de Liaozhai") | 3.43 |
| Cao Xueqin kaj lia romano "Sonĝo en la Ruĝa Buduaro" | 4.39 |
| La tria ĉapitro el la romano "Sonĝo en la Ruĝa Buduaro" (I) | 5.49 |
| La tria ĉapitro el la romano "Sonĝo en la Ruĝa Buduaro" (II) | 6.37 |

### SCENEJO KAJ EKRANO

| | |
|---|---|
| Chuntao | 2.52 |
| Sekvu la "Spurojn de Amo" | 4.52 |
| "Damo Papilio" de Taiwan en Pekino | 6.52 |
| Pekina opero "Cao Cao kaj Yang Xiu" | 8.52 |
| Ekzota repertuaro "Transmaraj Moroj" | 10.52 |
| Filmado sur malnovaj vojoj de la Flava Rivero | 12.53 |

### POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO

| | |
|---|---|
| Pri la poemo "Al Yuan'er, kiu veturas komisiite al Anxi" | 1.27 |
| Pri la poemo "Forlaso de Baidi en la mateno" | 2.27 |
| Pri "Bambuo sur Roko" | 3.27 |

Nr. pĝ.

Pri la poemo "Okcidenta mont-rojo de Chuzhou" 4.27
Pri la poemo "Matene, adiaŭo al Lin Zifang ĉe Jingci-templo" 5.31
Pri "Rememoro pri la Sudo" 6.27
Pri "Chile-ebenaĵo" 7.27
Pri "Tranokto ĉe la Ponto de Acero" 8.27
Pri "Krizantemo" 9.27
Pri "Veturo sur monto" 10.27
Pri "Neĝado ĉe rivero" 11.27
Pri "Umefloroj" 12.27


## SPORTO KAJ HIGIENO


Zhao Youfeng kaj ŝia japana trejnisto 1.14
La termofonta konvaleska hospitalo Xiaotangshan 2.43
Por la 11-a Azia Sportkunveno 3.32
Specifa terapio kontraŭ vaskularito 6.30
40 jaroj de la fizikkultura kaj sporta afero de Ĉinio 8.16
"Hejmo" de aziaj sportistoj 9.37
Antaŭ la 11-a Azia Sportkunveno 9.39
Zhou Chengming, eminenta kuracisto pri reŭmatoida artrito 10.19
Drakboata konkurso sur Kunming-lago 10.11
Fiŝhoka konkurso inter ĉinaj kaj alilandaj eminentuloj 10.36
La medikamenta kaj sanprotekta afero de Ĉinio 11.16
La 11-a Azia Sportkunveno 12.02


AMUZOJ


Ĉina ŝako (I) 1.18
Ĉina ŝako (II); Interesa ĉina puzlo 2.26
Ĉina ŝako (III); Preni ŝakpecojn 3.40
Ĉina ŝako (IV) 4.30
Ĉina ŝako (V) 5.55
Ĉina ŝako (VI) 6.44
Ĉina ŝako (VII) 7.34
Ĉina ŝako (VIII) 8.40
Ĉins ŝako (IX) 9.23
Ĉina ŝako (X) 10.43
Ĉina ŝako (XI) 11.39
Ĉina ŝako (XII) 12.42


POR VIA SANO


Korposanigaj metodoj (XI) 1.30
Korposanigaj metodoj (XII) 3.37
Ĉina ĉigong-o (I) 5.53
Ĉina ĉigong-o (II) 7.41
Ĉina ĉigong-o (III) 9.26
Ĉina ĉigong-o (IX) 11.42

Nr. pĝ.


## SOCIA VIVO


Tricikloj en Pekino 4.46
Bakitaj batatoj de Pekino 5.38


FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO


Domkonstruado en ĉina kamparo 2.10
Telefono"Intima Fratino" 4.17
Sincera helpo al la kripluloj 6.06
Amatoroj de la pekina opero 8.10
Pri la asekura konscio de ĉinoj 10.30
For la falsajn kaj fikvalitajn komercaĵojn 12.22


## HISTORIAJ OBJEKTOJ


Brilas antikva mono 6.41
Raraj ŝtongravuraĵoj de Han-dinastio 8.30


LA IMPERIESTRA PALACO


Malkvieta Qianqing-palaco 1.52
Jiaotai-halo, Kunning-palaco kaj edziĝo de imperiestroj 3.52
Yangxin-halo kaj"Postkurtena Regado" 5.60
Loĝejoj de la imperiestraj edzinoj en la dinastioj Ming kaj Qing 7.52
Tajŝanghŭang kaj Ningshou-palaco 9.52
La palaca ĝardeno kaj murdo 11.52


## NACIECOJ


Kirgizoj 6.46
Sopiro al la hejmlando 8.45
Butera floro 8.46
Moroj de la jugura nacio 10.45
Malgranda va-a pentristino Zhang Ke 11.24


## VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ


Yixing, urbo de fajencaĵoj 2.06
Vizito al Golmud sur altebenaĵo 2.20
Urbetoj sude de Yangzi-rivero 3.06
En la arkta vilaĝo 4.06
Pekino birdvidata 7.46
Vizito de la Ardea Insulo 8.21
28 tagoj en Gobio 11.30
Festo de la vinbera urbo 12.24


VOJAĜO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO


Humen post sia malfermiĝo 4.22
Moderna agrikulturo en ĝermado 5.34
Nova koncepto de la ĉinaj kamparanoj 6.10

Nr. pĝ.

## LAŬ LA SUDA SILKA VOJO

Ĉe Jinsha-rivero 1.47
En la hejmloko de orĉevalo kaj jadkoko 2.32
Rivera vojo 3.48
En la malsupra baseno de Minjiang-rivero 4.32
Yibin, la pordo de Sichuan kaj Yunnan 5.41
Ŝtonpordoj sur la vojo Wuchidao 6.32
Zhaotong, urbo de facila trafiko 7.21
Vojaĝo en Wumeng-monto 8.47
Tri urbetoj en orienta Yunnan 9.45
Regiono Dianchi 10.47
Chuxiong, koridoro meze de Yunnan 11.32
Fama kultura urbo Dali 12.32

## INTERNACIECO KAJ AMIKECO

Ŝulda krizo de la disvolviĝantaj landoj 2.41
Sovetiaj baletistoj en Ĉinio 2.50
Sciencoj kaj teknikoj influantaj la ekziston de la homaro en la 90-aj jaroj 7.44
Turisma karavano de "Verda Stelo" en Ĉinio 10.32
Trajtoj de la disvolviĝa tendenco de la monda ekonomio en la 90-aj jaroj 12.19

### NIA MONDO

La karnavalo de londonaj nigruloj 1.32
La purpura lando Urugvajo 3.46
Religiaj ritoj en Japanio 5.58
Moroj de Omano 7.32
La Rikolta Festo de Barbadoso 9.24
La karnavalo de Binche 11.46

## ALIAJ ASPEKTOJ

Novjara saluto 1.02
INTER NI

## KOLORAJ BILDOSERIOJ

### SUR LA KOVRILO

Knabinoj ĉe ruino 1
Metiisto Li Shoucai faras argilan vazon kun desegno de drako kaj fenikso. 2
Nova ujgura dancistino Paŝa Umar 3
Nupto 4
Retrospektive al EPĈ 5
En somero 6
Usonanino, kiu vivas en la maljunulejo de Harbin, Ĉinio 7
Cao Cao kaj lia edzino, sceno el la pekina opero "Cao Cao kaj Yang Xiu" 8
Ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj en la tekunveno por la 40-jara jubileo de EPĈ 9
Membroj de la Orienta Ensemblo prezentas meksikian dancon. 10
Instruistino kaj infanoj 11
La Pekina Laborista Stadiono, la ĉefa konkursejo de la 11-a Azia Sportkunveno 12

Nr

### INTERNE DE LA KOVRILO

Laborantoj de la redakcio de EPĈ salutas la legantojn 1
Pentrado sur Tian'anmen-placo 2
Shaoxing 3
Luoxi-pontego de Panyu-gubernio en la Delto de Perlo-rivero 4
La Budho-sunuma Festo 6
La akvobaraĵo Gezhouba sur Yangzi-rivero 7
Amuza kunveno de popolaj kantistoj 8
Lukto en ondoj 10
Al la ĉielo 11

### FOTOJ SUR PAĜO 4

Montvilaĝo 1
Neĝo 2
Kampoj en printempo 3
Danco sur stilzoj 4
Floroj sur maljuna arbo 6
Sub pluvo 7
Lotusfloro 8
Ĉerizoj 10
Velŝipoj revenantaj 11
Kamionado de varoj al vilaĝoj 12
Ĝardenoj de Yangzhou 12

### SUR LA DORSKOVRILO

[ĈINAJ POŜTMARKOJ]

Palacaj kaj festaj lanternoj 1
Umefloroj 3
Utilaj birdoj 8
Memorigaj poŝtmarkoj kaj poŝtmarka bloko por la Azia Sportkunveno 9
Freskoj de Dunhuang 11

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Norda rivero de birdflugo 2
Montoj de Tabrizo de Irano en malvarma vintro; En milito inter Irano kaj Irako 4
Smolando de Svedio en vintro kaj somero 6
Gardistoj kontraŭ marondegoj; Akvomuelejo 10
Memoraĵoj por la 40-jara jubileo de EPĈ 5
Ĉina masaĝo 7
Prezentado de sportistoj 12



Pentraĵo farita de Chen Dazhang por la poemo

SUN GUOLIANG:

# Ĉinio en la Internacia Senanalfabetiga Jaro

EN la nuna epoko, kiam la homaro konkeras la kosmon, rapide universaligas intelektigajn aparatojn kaj baldaŭ malkovros la heredecan sekreton, troviĝas en la mondo 965 milionoj da analfabetoj kun la aĝo super 15 jaroj, kiuj konsistigas 27.7% de la totala nombro de la adoltuloj. Krome, 130 milionoj da 6-11-jaraj infanoj ankoraŭ ne vizitas lernejon. Se oni ne alprenos efikajn rimedojn, en la 21-a jarcento ili iros en la vicaron de analfabetoj.


Analfabeteco kontraŭ la homa progreso, kiel plej grava socia problemo en la nuna epoko, maltrankviligas ĉiam pli multajn personojn. Jam en 1987, UN deklaris, ke 1990 estos la Internacia Senanalfabetiga Jaro, kaj alvokis, ke oni likvidu analfabetecon antaŭ la jaro 2000. En la pasintaj multaj jaroj la diverslandaj registaroj plenforte faris senanalfabetigan laboron kaj akiris rimarkindan sukceson. Ankaŭ Ĉinio ne estis escepto.

Ĉinio estas disvolviĝanta lando, kun la plej granda loĝantaro en la mondo, kaj ankaŭ unu el la landoj kun plej multaj analfabetoj. Antaŭ 1949, al la vasta popolo mankis kondiĉoj ricevi edukon, la nombro de la infanoj, kiuj vizitis lernejon, konsistigis ĉ. 20% de la totala nombro de la lernoaĝaj infanoj kaj la nombro de la analfabetoj — ĉ. 80% de la tuta loĝantaro.

Post kiam la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis en 1949, tio multe ŝanĝiĝis. De la 50-aj ĝis la mezo de la 60-aj jaroj, Ĉinio liberigis 102.72 milionojn da loĝantoj el analfabeteco kaj la procentaĵo de la analfabetoj reduktiĝis al 38%. La laboristoj kaj kamparanoj, liberiĝitaj el analfabeteco, ludis grandan rolon en konstruado.

Post oktobro 1976, la ĉina registaro denove metis en sian tagordon senanalfabetigan laboron kaj altigon de la kvalito de la ĉina nacio. Ĝi publikigis "Instrukciojn pri Senanalfabetigo", post tio, instituciој pri senanalfabetiga laboro rapide restariĝis en diversaj lokoj, havigis al si profesiajn laborantojn kaj monrimedojn kaj ellaboris koncernan planon. La senanalfabetiga laboro fariĝis grava por la lokaj registaroj, kaj precipe por edukaj departementoj. Ĝis 1989, Ĉinio liberigis 170 milionojn da loĝantoj el analfabeteco, la procentaĵo de analfabetoj en la tuta loĝantaro reduktiĝis al 20%, kaj tiu en la urbanaro kaj laboristaro reduktiĝis al ĉ. 5%. Pli ol duono de la gubernioj de Ĉinio fundamente likvidis analfabetecon de la loĝantoj kun la aĝo de 15-40 jaroj.

La ĉina registaro alte taksas la alvokon de UN pri la Internacia Senanalfabetiga Jaro. La 8-an de julio de la kuranta jaro la Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio kaj aliaj 9 departementoj kaj societoj kune okazigis telefonan kunvenon kadre de la lando por bonvenigi la Internacian Senanalfabetigan Jaron kaj alvokis la tutan landon batali por liberigi la junulojn kaj plenkreskulojn el analfabeteco en la kuranta jarcento. Post la kunveno fondiĝis la Kunordiga Grupo de la Tutlanda Senanalfabetiga Laboro. Je la 5-a de marto ĉi-jare, Li Tieying, membro de la Ŝtata Konsilantaro kaj estro de la Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio, kun la ĉina registara delegacio sub sia gvido, ĉeestis la Mondan Tutpopolan Edukan Konferencon kunvokitan en Tajlando. En la lastaj aprilo kaj majo la ĉina registaro faris seriozan kontrolon al la tutlanda senanalfabetiga laboro. En aŭgusto okazis en Pekino la Tutlanda Kunveno por Honori Eminentajn Senanalfabetigajn Laborantojn. De



En senanalfabetiga kurso en vilaĝo

septembro 1989 ĝis nun, 7 159 000 analfabetoj partoprenis en lernado, post ekzameno 4 290 000 el ili liberiĝis el analfabeteco, kun pliiĝoj de 81.3% kaj 114.5% respektive, kompare kun tiuj de 1989. Aperis la plej bona situacio de la senanalfabetiga laboro de Ĉinio en la periodo post 1983.

En la senanalfabetiga laboro Ĉinio alprenis ĉefe jenajn rimedojn:

Unue, plifortigi la gvidon de diversnivelaj registaroj super la laboro, starigi kaj perfektigi diversnivelajn instituciojn por gvidi la laboron. Ekz., Sichuan-provinco starigis gvidan grupon pri senanalfabetiga laboro kun sia vicestro kiel la ĉefo, 10 provincdepartementaj respondeculoj kiel vicĉefoj aŭ membroj. Ankaŭ la Provinca Eduka Komisiono plifortigis sian gvidon super la senanalfabetiga kaj eduka laboro farata inter la kamparanoj. Plejparto de la urboj, subprovincoj, gubernioj de la provinco starigis gvidan aŭ kontrolan grupon pri senanalfabetiga laboro. De 1989 ĝis nun la provinco lernigis pli ol 1 500 000 junajn kaj plenkreskajn analfabetojn, el kiuj ĉ. 850 000 liberigis sin el analfabeteco post ekzameno.

Due, oni praktikas laŭkontraktan respondecan sistemon en la laboro. Ĉinio aplikas rimedon, uzatan en la ekonomia konstruado, en senanalfabetiga laboro. Ekz., Shaanxi-provinco disvastigas la sperton de la administraj kaj edukaj institucioj de Fufeng-gubernio pri duobla laŭkontrakta respondeca sistemo. La gvidantoj de administraj institucioj, nome tiuj de la guberniaj, distriktaj (aŭ urbetaj) registaroj kaj vilaĝaj komitatoj, kontraktas pri tiu laboro kaj solvas malfacilajn problemojn en ĝi. La koncernaj gvidantoj de la vilaĝa komitato devas mobilizi la analfabetojn al la lernado kaj garantii certan nombron de la lernantoj. La gubernia registaro kontrolas la senanalfabetigan laboron de la koncernaj personoj kaj premias aŭ punas ilin laŭ ilia laboro. La vicestro pri senanalfabetiga laboro de la eduka komisiono de la gubernio, profesiaj funkciuloj pri la laboro de tiaj komisionoj de distrikto kaj urbeto kaj estroj de la elementaj lernejoj de ĉiuj vilaĝoj respondecas pri administrado kaj instruado en la laboro. La vilaĝa elementa lernejo plenumas senanalfabetigan instruadon. La gubernio asignas monon kaj donas premion aŭ punon laŭ la nombro de loĝantoj liberigitaj el analfabeteco. Tiu sistemo plialtigas la aktivecon de la diversnivelaj gvidantoj kaj instruistoj kaj plirapidigas la laboron. Nun en ĉiuj partoj de Ĉinio estas aplikata tiu sistemo.


Trie, la ĉefa objekto de la senanalfabetiga laboro en Ĉinio estas kamparanoj, ĉar 90% de la ĉinaj analfabetoj estas kamparanoj. En la lastaj jaroj Ĉinio kombinis la laboron kun la fizika laboro kaj vivo de la kamparanoj, kun ilia lernado de agrikulturaj teknikoj, por ke la kamparanoj rigardu tion kiel la ĉefan vojon sin riĉigi. Enketo farita de koncerna departemento al 5 500 kamparanaj familioj de iu provinco montras, ke en 1988 la jara pokapa enspezo el vendo de agrikulturaj kaj flankokupaj produktoj por ĉiu kamparana familio kun diplomito de supera mezlernejo estis 89.49 juanoj, tiu kun diplomito de malsupera mezlernejo — 89.03 juanoj kaj tiu kun diplomito de elementa lernejo — 88.62 juanoj. Kaj tia enspezo de la analfabeta familio estis nur 56.12 juanoj. La fakto montris, ke la malriĉaj familioj plejparte estas analfabetaj aŭ duon-analfabetaj. Tio multe vekis la aktivecon de kamparanoj por sin liberigi el analfabeteco.

Estas tre grave en la kamparo ellabori regulojn pri senanalfabetiga laboro. Ekz., iuj distriktoj de Tongling-gubernio de Anhui-provinco ellaboris regulojn pri la laboro. La ĉefa enhavo estas jene: Se malpli-ol-25-jaraj analfabetoj post persvado ne volas partopreni lernadon, iliaj familioj devas pagi por senanalfabetiga laboro. La analfabetoj ne povas fariĝi ŝtatoficistoj nek labori en urbetaj kaj distriktaj entreprenoj. Iu vilaĝa cementa fabriko de la gubernio decidis varbi klerigitajn junulojn kiel laboristojn. Tuj poste, pli ol 40 junaj analfabetoj vizitis vesperan lernejon kaj lernis sufiĉe diligente.

Kvare, senĉese plifortigi kaj plivastigi la senanalfabetigan instruistaron. Ekz., Henan-provinco nun havas 8 151 distriktajn senanalfabetigajn instruistojn, 15 504 vilaĝajn instruistojn pri senanalfabetiga laboro kaj edukado al kamparanoj kaj 37 553 kumulajn instruistojn. Ĉiu administra vilaĝo meznombre havas 1.13 instruistojn. Krome, la provinco havas ankaŭ 350 000 instruistojn de lernejoj funkciigataj de kolektivo. La provinco postulas, ke ĉiu el ili klerigu unu analfabeton. Tio akiris grandan sukceson.

Kvine, por preventi refojan analfabetiĝon de kamparanoj liberigitaj el analfabeteco pro forlaso de lernado, Ĉinio alprenas diversajn rimedojn plifortigi la akiritan atingon. Ekz., Shandong-provinco sendas klerigitajn junajn kamparanojn en postlaborajn elementajn lernejojn kaj kamparanajn kulturajn kaj teknikajn lernejojn, por ke ili sin perfektigu. Krome, oni okazigas teknikajn kursojn, prelegojn k.a. por solidigi la lernadon.

Kvankam la senanalfabetiga laboro de Ĉinio akiris novan sukceson, tamen la laboro alfrontas multajn malfacilojn. La situacio ankoraŭ estas serioza. La specimena enketo farita en 1987 al 1% de la tuta loĝantaro montris, ke Ĉinio havas 220 milionojn da analfabetoj, inter kiuj 72 000 000 kun la aĝo de 15-40 jaroj estas objekto de la senanalfabetiga laboro difinita de la ŝtato. Se oni klerigos kvar milionojn da analfabetoj ĉiujare, oni do bezonos 18 jarojn por forigi analfabetecon. 90% de la analfabetoj, inter kiuj 70% estas virinoj, dise loĝas en montaj, landlimaj, malproksimaj kaj nacimalplimultaj regionoj, kie ne facilas la trafiko, kaj la malfacilo en analfabeteco-forigo estas tre granda. Mi opinias, ke nur se la tuta socio havos klaran konon pri la malutilo de analfabeteco, ĉiuj civitanoj prizorgos, subtenos kaj partoprenos la senanalfabetigan laboron, ĝi povos akiri pli grandan sukceson. ■



LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (19)

# Fama kultura urbo Dali

Teksto de **XU YE** kaj **WANG QINGHUA**

Fotoj de **XU [illegible]NYAN**

Pordego de la antikva urbo Dali


Sur Erhai-lago






Pentraĵo de Zhang Shengwen de Nanzhao-regno

En la templo Changchundong



DE Dali ni suriris la vojon Yongchangdao, la lastan parton de la Suda Silka Vojo en Ĉinio. La vojo serpentas en Hengduan-montaro kaj transiras la torentajn riverojn Lancang kaj Nujiang.

Dali estas la ĉefurbo de la Dali-a Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco. Kun mirinde ĉarmaj pejzaĝoj, longa historio kaj modestaj moroj ĝi meritas esti fama kultura urbo.




## MOROJ EN LA ANTIKVA URBO

Dali, nomata Yeyu en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p.K.), situas en la nordokcidenta parto de Yunling-montaro kaj tuŝas okcidente Cangshan-monton kaj oriente Erhai-lagon. Erhai, alinome Kunming-lago, portis la nomon Yeyu-lago en la antikveco. Ĝi havas formon de orelo. Por serĉi vojon al Hindio, imperiestro Wudi (140-87 a. K. sur trono) de la Okcidenta Han-dinastio siatempe sendis iri suden. Favore de la strategie grava loko, la indiĝena reĝa tribo



Originala konstruaĵo de baj-oj



En la Foiro de "Tria Monato"

monopoligis la komercon, ke ĉiuj senditoj estis malhelpataj en la regiono Erhai. Imperiestro Wudi mobilizis grandan nombron da popolanoj por fosi lagon en Chang'an, la ĉefurbo de la dinastio, imite al Erhai-lago, por trejni akvoarmeon.

Ĉie, ĉu en la antikva urbo, ĉu en kamparanaj domoj, senteblas moroj kaj kutimoj de baj-oj. Kvankam la loko tenas de longe intiman rilaton kun centra Ĉinio, tamen la baj-oj ĉiam konservas sian riĉan tradician kulturon.

Ni prenu drakon kiel ekzemplon. En centra Ĉinio drako estas simbolo de la plej supera aŭtoritato de imperiestro. Sed vidiĝas figuroj de drako ĉie en la lokoj loĝataj de baj-oj, ĉu sur mebloj, ĉu sur tegmentrandoj, ĉu sur vestoj kaj ornamoj. La drako, kiun baj-oj kreas, perdas sian sanktecon kaj havas formon de ŝatata lotusfloro. Ankaŭ vesperto estas beligita de baj-oj. Ĝi ne plu estas monstra kiel priskribita en mito, sed bela kiel papilio. Popolaj artistoj ornamas sian vivon per vesperto en formo de peonio, lotusfloro aŭ lepora kapo. La baj-oj estas tualetemaj kaj ŝatas porti vestojn de sia propra nacio. La vestoj kaj ornamoj de baj-aj virinoj okulfrapas. La knabino havas harplektaĵon ligitan per ruĝa ŝnureto supre de la frunto, portas superveston kun striktaj manikoj, kun senkoluma veŝto ekstere kaj larĝan zonon ĉe la talio.

La loĝdomoj de baj-oj distingiĝas en la arkitektura historio de Ĉinio. La antikva urbo Dali konstruiĝis en la 14-a jc. Dank' al multfoja rekonstruado, la tuta urbo bone konserviĝas. Ĝi estas ĉirkaŭita de muroj 8 m altaj. Starante sur la muro, oni povas vidi la loĝdomojn viciĝantajn en bona ordo. La kortoj plejparte rigardas orienten, ĉiu el tri etaĝdomoj kaj ekranmuro. Baj-oj donas apartan atenton al ornamado de la ekranmuro kaj portalo flanke de ĝi, rigardante ilin kiel la plej gravan parton de la loĝdomoj. La portalo surhavas ŝtongravuraĵon, ksilografaĵon, argilmodlaĵon kaj koloran pentraĵon. Sur la ekranmuro, kun kalko kiel fono, vidiĝas delikata tuĉpentraĵo, gravuritaj versoj de eminentuloj aŭ inkrustitaj kolore kuriozaj pecoj de marmoro.

Kiam ni eniris korton de baj-oj, la gastama mastro ripozigis nin sub kamelio kaj granatarbo kaj proponis al ni po tri tasojn da teo kun malsamaj gustoj. La unua taso entenas fortan teon iom amaran; al la dua aldoniĝis nuksokernoj, laktaĵo kaj sukero kaj al la tria mielo. Ili implicas la sencon, ke ĉiu homo travivas amarecon, dolĉecon kaj rememoron (postguston).

## SANKTA LOKO


Antaŭe en la lokoj loĝataj de baj-oj oni kredis je primitiva religio. En Tang-dinastio (618-907) tie furoris budhismo. Poste enkondukiĝis taoismo kaj meze de la 19-a jc kristanismo kaj katolikismo. En Dali troviĝas diversaj religiaj konstruoj, kiuj estas konsistiga parto de la tieaj pejzaĝoj.

Okcidente de Dali majestas la Tri Pagodoj de Chongsheng-templo. La plej granda en la mezo nomiĝas Qianxun-pagodo. Sude

kaj norde de ĝi staras paro da kavaj pagodoj ok-angulaj. Qianxunpagodo estis konstruita en 823-859. En la lastaj jaroj oni riparis la pagodon kaj trovis en la supro kaj bazo 500 historiajn objektojn el oro, bronzo, agato kaj glazuro kaj pli ol 100 budhajn statuojn, el kiuj unu estas ora kun pezo de unu kg. Inter la historiaj objektoj oni trovis tri volumojn da manuskriptoj de budhisma sutro. Du volumoj kun la titolo "Vajraparamita Sutro" paperaj kaj la tria estas ruĝe skribita sur gazo en la hana kaj sanskrita lingvoj. Ili pruvas la kontakton de centra Ĉinio kaj aliaj lokoj laŭ la Suda Silka Vojo.

Oriente de Erhai-lago kuŝas Jizu-monto. Tie 36 temploj kaj 72 monaĥejoj kaŝiĝas inter verdaj pinoj kaj cipresoj. La monto estas konata kiel fama budhisma sanktejo kaj pitoreskejo de Ĉinio. La temploj kaj monaĥejoj estis konstruitaj en Tang-dinastio de Mahakasyapa, la unua disĉiplo de Ŝakjamunio, kiu predikis tiam en Yunnan. En 1875-1908 en la monto estis 108 temploj kun Zhushengtemplo kiel la centro, kie vivis ĉ. 5 000 bonzoj kaj monaĥoj.

Tamen, preskaŭ en ĉiuj lokoj de Dali loĝataj de baj-oj oni senescepte kultas sian propran sinjoron kaj kredas je dioj kaj ŝamanismo. La kulto al propra sinjoro estas tre populara, enpenetriĝas en la ĉiutagan vivon kaj havas grandan influon sur ĉiun lokon loĝatan de baj-oj. En ĉiuj vilaĝoj de baj-oj estas templo de sinjoro. Unu aŭ pluraj vilaĝoj kultas unu saman sinjoron, protektanton de la vilaĝoj. Sinjoroj ĝenerale apartenas al herooj aŭ bonfarantoj en la historio de sia propra nacio, reĝoj, oficistoj kaj generaloj en la lokoj loĝataj de baj-oj, dioj adorataj de budhismo, konfuceanismo kaj taoismo kaj ankaŭ montoj, ŝtonoj kaj bestoj. En la datreveno de la naskiĝo aŭ morto de la propra sinjoro aŭ ĉe la komenco kaj fino de la jaro, ĉiuj vilaĝanoj okazigas grandan solenon, tenante super si ruĝajn ombrelojn kaj flagojn kun




emblemo de suno, luno, drako kaj feng-o (bonaŭgura birdo en mito de Ĉinio). En Dali adoriĝas almenaŭ 400-500 sinjoroj kun malsamaj honoraj titoloj. La kulto al propra sinjoro estas religia kredo propra al la baj-oj.

## LA FOIRO DE "TRIA MONATO"


La Foiro de "Tria Monato" estas antikva foiro de okcidenta Yunnan kaj ankaŭ solena festo de la baj-oj. De la 15-a ĝis la 20-a de la tria monato ĉiujare laŭ la luna kalendaro, oni svarmas ĉe la piedo de Cangshan-monto, kie okazas la soleno. Ili interŝanĝas varojn, faras ĉevalvetkuron kaj distras sin per kanto kaj danco.

Origine la foiro estis kunveno de budhistoj. Poste la loko, kie oni recitis sutron, fariĝis foirejo. Kun la disvolviĝo de komerco la loko de la Foiro de "Tria Monato" fariĝis iom post iom komercejo sur la Suda Silka Vojo.


La antikva ĉina granda vojaĝisto Xu Xiake iam spertis la Foiron de "Tria Monato". Li pririgardis du tagojn kaj skribis en notlibro: "En la foiro vendiĝas diversaj varoj de multaj provincoj kaj ankaŭ de Yunnan loĝata de naciminoritatoj, kaj dense punktiĝas standoj. Ĉirkaŭ ili svarmas viroj kaj virinoj. La standoj ofertas ĉefe drogherbojn, feltojn, teksaĵojn, bronzaĵojn kaj lignaĵojn." El tio videblas, ke jam en Ming-dinastio (1368-1644) en la foiro regis granda vigleco. Tiam en ĝi negocis komercistoj ne nur el centra Ĉinio, la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang kaj Tibeto, sed ankaŭ el Birmo.

En la pasintaj jaroj pli prosperiĝas la foiro. Kamparanoj plejparte aĉetas en ĝi ĉiutagajn bezonaĵojn. Baj-aj knabinoj venas aĉeti doton por si. Multaj alilokanoj ŝatas delikatajn pajloplektaĵojn, marmoraĵojn kaj tradiciajn plektaĵojn de baj-oj. La ĉinaj drogherboj, vendataj en la foiro, ĉiuj estas produktitaj en Yunnan. Sako post sako da drogherboj amasiĝas sur montodeklivo kaj ĉie sterniĝas strioj de ruĝa ŝtofo kun laŭdvortoj pri la ofertaĵoj. La sakoj altiras multajn klientojn. Nokte la vendantoj ripozas inter la sakoj. ◼

Loĝejo de baj-oj



Fiŝista vilaĝo ĉe Erhai-lago



## ESP-NOVAĴOJ

● Por sukcesa gvido de Esperanta instruo, la Ĉina E-Ligo decidis starigi komisionon de la lingva instruado, kiu jam ekfunkciis en la 29-a de junio 1990.

● La 2-an de septembro 1990 la Pekina E-Asocio okazigis kunvenon por raporti pri la 75-a UK. Liu Ling, aganta ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj Hou Zhiping, vicestro de la redakcio de El Popola Ĉinio, konigis al la ĉeestantoj la 75-an UK kaj siajn impresojn pri Kubo. En la kunveno oni projekciis lumbildojn pri pejzaĝoj de Havano, kiuj tre plaĉis al la 70 ĉeestantoj.

● De la 27-a de aŭgusto, la Guangdong-a Popola Radio funkciigis la 2-an E-kurson, kiu daŭras 30 minutojn ĉiutage. Ĝia instruaĵo estas "Esperanto" eldonita de la Guangdong-a Alteduka Eldonejo.

● Huayuan-hotelo de Guangdong okazigis la duan 6-monatan E-kurson en aŭgusto ĉi-jare. Ĝia unua kurso komenciĝis januare. Estas la unua fojo, ke E-kurso okazis en la 5-stela hotelo en Ĉinio.

● En aŭgusto komencis akcepti lernantojn la koresponda E-kurso de la Eduka Instituto por Adoltoj sub la Hefei-a Politekniko. Ĝi havas elementan kaj altan staĝojn, ĉiu daŭros unu jaron.

● Ĉi-somere finiĝis la 5-a E-kurso en la Qingdao-a Oceanografia Universitato. Ĝin partoprenis 73 studentoj el 8 fakultatoj. Post unusemestra lernado ili ĉiuj sukcesis en la ekzameno.

● La 8-a de aŭgusto 1990 estis la unua E-tago de Hainan. En tiu tago la Hainan-a E-Asocio okazigis solenan kunvenon, kiun partoprenis 53 esperantistoj de Hainan kaj samideanoj el Interna Mongolio, Xinjiang, Hubei, Sichuan kaj Shenzhen. Tiun tagon okazis ankaŭ amuza vespero, kiun ĉeestis pli ol 300 personoj. La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio faris memoran stampilon en Esperanto por tio kaj kune kun la Hainan-a E-Asocio emisiis memoran poŝtkarton en Esperanto. La supre menciitajn aktivadojn publikigis la lokaj radio, ĵurnalo kaj televida stacio.

● De la 11-a ĝis la 16-a de aŭgusto, la Esperanta Delegacio de Takatsuki-shi, Japanio, konsistanta el 5 personoj kun NISHIKAWA Toyozo kiel estro vizitis Ŝanhajon, Changzhou kaj Suzhou sinsekve kaj faris amikecan interŝanĝon kun la lokaj E-asocioj.

● En la 31-a de aŭgusto okaze de la 80-jara datreveno de la naskiĝo de la forpasinta fama ĉina esperantisto Honfan la Jiangmen-a Poŝta-telekomunika Buroo emisiis memoran poŝtkarton en la ĉina lingvo kaj Esperanto kaj faris memoran stampilon kun lia portreto. Honfan estis unu el la fondintoj de "El Popola Ĉinio" kaj ĉefredaktoro de "Esperanto-Ĉina Vortaro".

● Signifa atingaĵo sur kampo de kulturo estis la 3-a Internacia Tutsovetia Festivalo de Esperanta Arto "EOLA 90", kiu okazis en Volĵskij, USSR, en la tagoj 2-8-a de majo 1990. La festivalo estis la plej granda Esperantoevento en la lastaj tempoj. La partoprenantoj de la festivalo, 230 personoj reprezentantaj sep landojn kaj 22 naciojn, renkontiĝis kun ega gastamo kaj koreco flanke de la organiza komitato.

Dum la festivalo prezentis solistoj, korusoj kaj artaj ensembloj. Krom tio, okazis ankaŭ oratora konkurso, prelegoj, prezentado de filmoj kaj ekskursoj, ekz. la franca teatro "KALLIMA", la pola kabareto "AMUZO", la usona filmo "MONDVIDO", la antikva ĉina akupunkturo ktp.

● La Balta Esperanto-Kongreso okazis de la 10-a ĝis la 19-a de julio en urbeto Jelgava. Ĉeestis ĉirkaŭ 400 partoprenantoj el diversaj sovetaj respublikoj kaj ankaŭ el Britio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Germanujo kaj Pollando. Ĝia temo estis: "Rolo de Esperanto en protekto de la lingva kaj kultura diverseco de malgrandaj nacioj".

Partoprenantoj de la 3-a Internacia Tutsovetia Festivalo de Esperanta Arto



XUE MEIXIAN:

# Mia volontulado en la Centra Oficejo de UEA

PASINTJARE mi volontulis tri monatojn en la Centra Oficejo de UEA, intervjuinte kiel raportistino de Radio Pekino la 74-an Universalan Kongreson de Esperanto okazintan en Brajtono, Britio. Kiam mi sidis en aviadilo de Londono al Roterdamo, mi havis maltrankvilon: kiel mi sola pasigos la 90 tagojn en la lando tute fremda al mi?

Kiam mi venis kun valizoj al la elirejo de la flughaveno Schiphol, mi tuj vidis altstaturan s-inon min salutanta kun svinganta mano. Jen mia amikino Loes Demmendaal, ĉe kiu mi gastloĝos dum mia restado en la CO. Post unu horo da aŭtomobila veturado mi jam sidis en ŝia gastoĉambro. Loes estas esperantistino afabla kaj gastama. Ŝi gastigis multajn esperantistojn-amikojn de diversaj landoj. Estis intime kaj agrable revidiĝi kun la malnova amikino en ŝia hejmo. Ambaŭ ni havis multon por rakonti unu al la alia kaj nia babilado nerimarkite daŭris ĝis profunda nokto.

En la unua tago de mia deĵoro en la CO, ties direktoro s-ro Neil Salvesen afable prezentis min al siaj oficistoj kaj detale konigis al mi la laborsistemon. En la CO multas diversaj laboroj destinitaj al volontuloj, sed la direktoro kaj la ĝenerala direktoro ambaŭ estis tre afablaj kaj ne premis min per tro da rutinaj laboroj. La trimonata volontulado, kvankam mallonga, larĝigis al mi la vidkampon kaj ebligis al mi lerni pli multe ol mi faris por la CO.

La intenseco kaj laborefiko de la CO faris sur mi profundan impreson. La CO dungis 12 oficistojn kaj ĉiu plenumas sian fiksan taskon ne malpezan. Unu persono ame nutras la 20-paĝan monatan revuon "Esperanto" bildigantan la movadon en monda skalo, unu persono fruktodone administras la Libroservon kun preskaŭ trimil titoloj kaj neta gajno de pli ol 60 000 guldenoj jare, unu persono respondecas pri provlegado de la revuo kaj senprokrasta ekspedo de mendaĵoj, unu persono zorgeme redaktas kelkcent-paĝan jarlibron riĉan je ĉiuj necesaj informoj, unu persono sin okupas pri organizado de ĉiujara UK. Krome, ili devas pritrakti ĉiutage dekojn da diversaj poŝtaĵoj el ĉiuj mondpartoj kun helpopetoj, aŭ konsiloj, konsultoj, aŭ mendoj de libroj, gazetoj, diskoj aŭ kasedoj, akcepti vizitantojn sin anoncitajn kaj surprizajn, bone zorgi kaj servi al miloj da membroj...

Laŭ la ampleksaj laborkampoj, la 12-membra teamo estas stabo tro malgranda por UEA kiel internacia organizaĵo. Tamen ĉio en la CO iras glate kiel sur butero. La efikan funkciadon la CO ŝuldas al siaj diligentaj kaj sindonemaj oficistoj, kiuj preferas rezigni sian ripozon ol prokrasti sian laboron. Cetere gravas, ke la CO havis lertan direktoron kiel sian motoron, kiu sciis bone kaj harmonie kunlabori kun la sperta ĝenerala direktoro, sciis bone utiligi la homrimedojn, sciis bone aranĝi la oficejajn aferojn kaj antaŭdecidi prioritataĵojn.

La CO kun 12 oficistoj el 8 landoj estas internacia familio en vera senco. Ĉiaj membroj vivas kaj laboras harmonie kaj amike kiel familianoj. Ili ĉiuj montriĝis tre afablaj kaj helpemaj. Ekzemple, kiam mi, nova membro, aŭ pli trafe dirite, gasto de tiu ĉi familio, komencis lerni komputilan manipuladon, mi havis nenian ideon pri la multkapabla kaj homeca maŝino kaj iĝis stulteta side antaŭ terminalo, s-ro Ksaĉjo restis ĉiam pacienca, kaj detale klarigis instruante kaj gvidante min progresi.

Mi konstatis, ke la CO fakte estas ankaŭ trejnejo de la lingvo kaj la movado. Tie oni uzas ekskluzive la internacian lingvon kaj parolas ĝin tiel nature, flue kaj vivece kiel la gepatran lingvon, kvankam ĉiu kun sia aparta stilo. Krome, la CO estas bona loko por informi pri la malsamaj aspektoj kaj spertoj de la movado en ĉiuj mondpartoj kaj havigi sciojn malfacile akireblajn aliloke, kio ja estas tre grava kaj valora por mi kiel profesia esperantistino.

Mi tre ĝojis kaj nun ankoraŭ kun dankemo memoras pri miaj intervjuoj de la novaj estraranoj de UEA. En la lasta tagdeko de septembro pasintjare, la nova estraro okazigis sian unuan laborkunsidon en la CO. Mi volis intervjui ilin, sed samtempe timis, ke mi ne atingus la celon pro ilia tempomanko. Min tre surprizis kaj kompreneble ege ĝojigis, ke ĉiuj estraranoj afable akceptis mian intervjuon, serioze kaj detale voĉigis siajn brilajn kaj inspirajn ideojn kaj planojn. Menciindas, ke ili alte taksas kaj tre zorgas pri la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino kaj la ĉina movado kaj donis valorajn kritikojn kaj konsilojn. Ne dubindas, ke kun tiu vivecplena estraro, UEA atingos novajn sukcesojn dum ĝia deĵorperiodo.

Dum mia restado en la CO, la direktoro bonintence donis al mi sufiĉe da libera tempo, por ke mi povu ĉeesti diversajn esperantistajn renkontiĝojn, gasti ĉe amikoj, koni la lokan Esperanto-movadon kaj pliigi sciojn per homaj kontaktoj.

Inter la renkontiĝoj, kiujn mi ĉeestis, elstaris la Kultura Semajnfino organizita de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj de Nederlando. Ĝi fakte



La aŭtoro (maldekstre) kun veteranaj esperantistoj de Nederlando

estis dutaga jarkunveno kun certa skalo kaj multnombra ĉeestantaro. La fama Esperanto-poeto William Auld el Britio kaj la ŝatata nederlanda verkistino Rejna de Jong honoris la semajnfinon per sia ĉeesto kaj ravis la ĉeestantojn per belaj prelegoj. Krome, la organizantoj regalis ankaŭ per prezento de japana paperfalda arto, kurso por komencantoj, interesa kvizo kaj viglaj distraĵoj. Mi, gasto el malproksima Ĉinio, estis invitita raporti pri Esperanto en Ĉinio.

Se oni foliumas la revuon "Esperanto", oni facile konstatas, ke similaj aranĝoj abundas en Eŭropo tra la tuta jaro. Mi kredas, ke la ĉina movado forte disvolviĝos ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite, se la ĉinaj esperantistoj havos okazon kaj kondiĉojn ofte renkontiĝi, praktiki kaj uzi la lingvon kaj unuanime klopodos jarojn.

La ekzisto kaj evoluo de Esperanto bezonas diligentajn sindonemajn semantojn, kaj tiajn mi vidis. Ili estas ordinaraj homoj, tamen faras eksterordinarajn aferojn kortuŝajn. Nederlanda esperantistino Marjet Erasmus, kiun mi konis dum la 71-a UK en Pekino kiel ne tre lertan komencantinon, sed du jarojn poste ŝi jam kuraĝe prenis sur sin la LKK-anecon pri gazetara servo de la 73-a UK kaj tre bone sukcesis. Kiel patrino de tri plenkreskaj filoj, ŝi devus havi sufiĉe da libera tempo, sed fakte ŝi estis neimageble okupita. Tri plenajn tagojn ĉiusemajne ŝi volontule dediĉas al la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Ŝi tre aktivas kaj atentas varbadon por la movado, precipe inter junuloj. Kien ajn ŝi iras, ŝi ĉiam kunportas en sia mansako foliojn pri Esperanto por eventuala diskonigo, kiun ŝi neniam hezitas fari, se nur troveblas ŝanco. Unu el ŝiaj ĝojoj, aŭ alivorte fieroj, estas ke ŝi sukcesis fari sian edzon s-ron Hans tre fidela adepto de Esperanto. Nun s-ro Hans kun favora socipozicio entuziasme laboras por pligrandigi la influon de Esperanto klopodante enkonduki la Internacian Lingvon en la Eŭropan Komunumon. Menciindas, ke lia klopodado ricevis subtenon de la eminentuloj en nia movado. S-ino Marjet kontribuas al la disvastigo de Esperanto, ne ŝparante monon, tempon kaj energion, dum Esperanto malfermis al ŝi vere novan vivkampon, kaj ŝi tion tre ĝuas.

Blinda esperantistino s-ino Nora Moerbeek gajnis respekton per sia solida agado. De dekoj da jaroj ŝi diligente laboras libertempe por kelkaj Esperanto-organizaĵoj, plenumante diversajn funkciojn, kaj senpage instruas la lingvon. Ŝi pacience, senlace kaj persisteme semas kaj semas. Ne malfacilas imagi, kian persistemon ŝi devas havi por tio por dekoj da jaroj! Ŝi lasis sian spuron ankaŭ en la literatura kampo. Pasintjare la libro "Anne Frank ne Estas de Hieraŭ" esperantigita kaj eldonita de ŝi gajnis la premion "Infanlibro de la jaro 1988" dum la 74-a UK. Cetere, ŝi kune kun sia edzo, s-ro Rob Moerbeek, ankaŭ afabla veterana esperantisto, entuziasmas por amikeco kun alilandaj samideanoj. Ekzemple ili fondis "Amikan Rondon por Ĉinaj Esperantistoj" kaj el sia poŝo invitis ĉinan blindan esperantiston al la 73-a UK en Roterdamo. Ili vivas simple kaj modeste, tamen ili estas malavaraj por la disvastigo de Esperanto kaj la movado de la evoluantaj landoj.

Inter la renkontitaj esperantistoj troviĝas nemalmultaj aŭskultantoj de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino kaj legantoj de EPĈ. Kun ĝojo mi konstatis, ke niaj Esperanto-disaŭdigo kaj gazeto trovas varman bonvenon. D-ro Joszef Kondor el Federacia Respubliko de Germanio ja bone ekzemplas. Li fariĝis fidela aŭskultanto de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino jam de ĝia komenciĝo en 1964. Dum la 25 jaroj li ĉiutage aŭskultis, serioze faris notojn kaj ĝustatempe sendis raportojn pri la aŭdebleco. Se li ial ne povis aŭskulti, li petis sian edzinon surbendigi la programon. Informiĝinte pri mia trimonata restado en Eŭropo, li kaj lia edzino tuj invitis min viziti Federacian Germanion. Aparte intime estas gasti ĉe ili, ĉar ili multfoje akceptis ĉinajn gastojn, inter kiuj estas miaj kolegoj kaj ankaŭ mia edzo. Kun ilia akompano mi sate ĝuis pitoreskajn vidindaĵojn, konatiĝis kun multaj amikoj, precipe ĝojige estas, ke mi havis ŝancon esti gasto de mia malnova amiko s-ro Bruno Vogelmann kaj lia filo kaj daŭriganto de lia Esperanta afero s-ro Dieter Vogelmann.

La tempo sagis kaj monatoj rapide pasis, sed la amikeco de samideanoj kaj la travivaĵoj spertitaj kun ili neforgeseble restos tre karaj en mia koro.

La praktikado profunde komprenigis al mi, ke Esperanto plene taŭgas por ĉiuj internaciaj rilatoj kaj efike solvas la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj. Mi estas konvinkita, ke certe realiĝos la profetaĵo de Einstein: "Esperanto estas la plej bona solvo de la idealo de internacia lingvo." Do, ni esperantistoj klopodu por ke Esperanto fariĝu kiel eble plej frue komuna lingvo de la homaro! ■

# Miaj tri kontaktoj kun Ĉinio

de **ALIRIO J. JUGO S.** (Venezuelo)

MI naskiĝis en la urbo Maracaibo (Okcidenta Venezuelo) en 1966. En ĉi tiu urbo loĝas multaj ĉinoj, kiuj senlace laboras precipe en vendejoj de diversaj varoj kaj restoracioj. En miaj infanaj jaroj multfoje mi vidis kaj admiris tiujn aktivajn, laboremajn personojn, kiuj por mia naiva menso aspektis tiel ekzotike kiel feoj aŭ anĝeloj. Tiam mia intereso pri Ĉinio komenciĝis. Vere tio estis mia unua kontakto kun Ĉinio.

Poste — en la venintaj jaroj — danke al la laboro de mia patrino, kiu pasie okupiĝis longtempe pri ceramiko, mi havis la duan kontakton kun Ĉinio. Hejme mia patrino dediĉis senfinajn horojn al la farado de diversformaj fajencaĵoj kaj preskaŭ magie el malvarma argilo ŝi kreis potojn, botelojn, vazojn, best- kaj homfigurojn kaj multajn aliajn objektojn. Por pligrandigi sian inspiron ŝi akiris ilustritajn ĉinajn gazetojn kaj la artaĵoj aperintaj en la bildoj de tiuj gazetoj taŭgis kiel modeloj por pluraj fajencaĵoj de ŝi faritaj. Ofte, tre ofte mi helpis la patrinan taskon kaj mi ne povas forgesi la momentojn, kiam mi gravuris eĉ ĉinan kaligrafaĵon sur vazo. Tian kaligrafaĵon mi sendube ne povis kompreni, sed strange ĝi estis tute signifoplena por la knabo, kiu mi estis. Jen la gravurita kaligrafaĵo fariĝis fantazia voĉo, kiu parolis al mi pri ĉiele, mildege flugantaj birdoj kaj papilioj.

Mi eklernis Esperanton en 1987. Tiujare venis mia tria kontakto kun Ĉinio. Jam junulo kun multaj interesoj kaj revoj, mi povis legi unuafoje la belegan gazeton El Popola Ĉinio kaj ĉinajn E-librojn. Legi ĉinan E-legomaterialon estis (kaj estas) tre interesa agado. En nia E-organizaĵo (VEU) ni havas bibliotekon kaj pro la granda kvanto da Esperantlingvaj libroj el Ĉinio, kiujn ni posedas en ĝi, ŝajnas al kelkaj personoj ĉi tie, ke Esperanto estas ankaŭ oficiala lingvo de Ĉinio kune kun la ĉina lingvo. Ne ĉiuj el tiuj personoj povas kompreni, kial granda lando kun antikvega kaj mirinda kulturo estas favora al Esperanto, lingvo ĝis nun ne bone konata en Venezuelo. Nuntempe mi estas fervorega esperantisto kaj abonanto de El Popola Ĉinio. Ĉiumonate senpacience mi atendas la novan numeron de la gazeto. Kiam ĝi atingas miajn manojn, fakte mi sentas Ĉinion ĉe mi.

Eble miaj tri kontaktoj kun Ĉinio ne estis tre eksterordinaraj aferoj, sed tro signifoplenaj en tri etapoj de mia vivo.

Ankoraŭ restas alia kontakto: la pli bona. Tio estas, ke fariĝu reala mia malnova revo. Kia revo? Vidi Ĉinion per miaj propraj okuloj. ■

---

La aŭtoro estas membro de la Venezuela Esperanto-Unuiĝo en Maracaibo.

---

# Ĉinio allogas min

de **GEORGE OTTO VASKE** (Brazilo)

DUONA mondo apartigas mian landon Brazilo de Ĉinio. Eble pro tioma distanco mia intereso pri la drakolando pli kaj pli intensiĝas. Por multjara EPĈ-leganto, multajn aferojn la revuo detale klarigas kaj danke al Esperanto, en pli ol 60 landoj scivolemaj homoj informiĝas kaj akompanas la grandiozan progreson, kiu okazas lastatempe en Ĉinio.

Laŭ mi ĉinoj estas tro modestaj homoj dirantaj ke ili estas loĝantoj de postiĝinta lando. Per tio ili eble volas igi homojn el malriĉaj landoj senti sin pli evoluintaj ol ili fakte estas. La ĉina industrio nenial perdas kompare kun la tiel diritaj unuamondaj landoj. Mi observas ke en ĉiu kampo kaj iniciato la ĉinoj staras ŝultro ĉe ŝultro je homoj de la plej evoluintaj potencoj de la mondo.

La prosperon de Ĉinio mi tre admiras, tamen direndas ke la ĉina popolo devas agi ege singar-

da post la pordomalferma politiko. Ĝi enportas novajn teknologiojn kaj grandajn kapitalojn kune kun avidaj investantoj. Mi timas ke ili senskrupule klopodos putrigi la moralon kaj morojn de la popolanoj. Mi asertas tion ne senkaŭze. Oni observas tion en sudamerikaj landoj, kie la internacia kapitalo ekspluatas malmultekostan manlaboron kaj eksportas lukron al sia devenlando, postlasante, por la enlandanoj, seriozan malriĉecon kaj teruran polucion. Kiam estiĝas krizo, la samaj ekspluatantoj proponas pruntedonojn je interezo varianta laŭ la pagokapablo de la prunteprenінta lando, sed ĉiam kun interezo kreskanta ĝis plena elĉerpiĝo de la lando, kiu gastigas fremdan kapitalon. Mi ege volas ke Ĉinio neniam falu en tian kaptilon. Nu, espereble mi timas vane, ĉar la ĉinoj estas multe pli saĝaj ol latinidaj registaroj, kiuj facile lasas sin trompi.

Laŭ ĉio, kion mi legadas pri Ĉinio, ĝia plej alloga provinco, por mi, pro ĝiaj situo, klimato kaj rikoltoj, estas Sichuan. Se iam Fortuno donos al mi puŝegon, mi nepre flugos al Ĉinio por kontakti milojn da ĉinaj esperantistoj dum E-eventoj, sed certe mi pli longe restados en Sichuan. Ties regiono allogas mian koron pli ol Ŝanhajo aŭ eĉ Pekino.

Aldirendas ankoraŭ ke, kiel la tutmonda esperantistaro, ankaŭ mi ŝuldas neniel sufiĉajn dankojn al Ĉinio pro tio ke ties regantaro senprecedence subtenas Esperanton per instruado kaj per subvencio al siaj Esperantaj eldonaĵoj. Imitinda ekzemplo por la Mondo!

Aldone, jen mencio pri malhelpa detalo ne tre grava sed ĝena: Kiam neĉino legas ĉinan rakonton, kiu enhavas nomojn de homoj, li ne kapablas tuj identigi ĉu la nomo apartenas al viro aŭ al ino. Tial devus antaŭiri eta teksto kun klarigo rilate al sekso kaj aldonaj karakteroj. ■

**ERGOTO DE BONAERO** (Argentino):

## 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio"

**(Pantuneto)**


*"El Popola Ĉinio" 40-jaras:*
*Per eseoj varie ĝi imponas,*
*per la belaj koloroj ĝi elstaras,*
*multaj homoj tra l' mondo ĝin abonas!*

*Per eseoj varie ĝi imponas,*
*kun perfekte klasika redaktado;*
*multaj homoj tra l' mondo ĝin abonas,*
*ĉar abundas la paĝoj pri l' Movado!*

*Kun perfekte klasika redaktado,*
*la enhavo tre certe ne vulgaras,*
*kaj abundas la paĝoj pri l' Movado!*
*"El Popola Ĉinio" 40-jaras!*

## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Zhaoyuan-gubernio
2. Turpan-gubernio
3. Zhongwei-gubernio
4. Jingbian-gubernio



## AMUZOJ

# Ĉina ŝako (XII)

de **RONG HUI**

### SPECIALA DISPOZICIO

Speciala dispozicio estas malsama ol la fina stadio. La lasta estas formita en ŝakludo, sed la antaŭa estas artisme aranĝita de ludantoj en vortformo, desegno aŭ amuzo. Sed tiu dispozicio kaj la movoj de la ŝakpecoj ne devas malobservi la regulojn de la ĉina ŝako.

En lernado de speciala dispozicio oni povas posedi atakan teknikon de la ŝakpecoj en kuna batalado, koni la artan penson de la dispozicio, riĉigi la imagon kaj krean povon kaj pliigi ĝojon en la vivo.


Vidu jenajn specialajn dispoziciojn de vorto, desegno kaj amuzo:

1. Vortformo: La ludantoj aranĝas ŝakpecojn en formo de vorto. En la bildo 1 oni faris el ŝakpecoj figuron de 19. Se la nigra partio la unua movas sian ŝakpecon, t.e. la ĉaron sur la 8-a linio du paŝojn antaŭen, li venkas. Nun la ruĝa partio la unua movas sian ŝakpecon kaj povas ŝakigi la nigran ĉefgeneralon je ĉiu movo. La konkretaj movoj estas jene: La ruĝa kanono moviĝas de la 4-a linio al la 5-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, kiu moviĝas de la 5-a al la 4-a; la ruĝa ĉevalo moviĝas antaŭen de la 5-a al la 4-a, kaptas la nigran ĉevalon kaj ŝakigas ankaŭ la nigran ĉefgeneralon, kiu devas moviĝi de la 4-a al la 5-a; la ruĝa ĉevalo moviĝas antaŭen de la 3-a al la 5-a kaj ŝakigas denove la nigran ĉefgeneralon, la nigra ĉaro moviĝas de la 8-a al la 5-a kaj kaptas la ruĝan kanonon; la ruĝa ĉevalo retiriĝas de la 4-a al la 3-a kaj ŝakigas refoje la nigran ĉefgeneralon, kiu retiriĝas unu paŝon; la ruĝa soldato moviĝas de la 3-a al la 4-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, kiu retiriĝas devove unu paŝon; la ruĝa soldato moviĝas de la 4-a unu paŝon antaŭen kaj ŝakigas ankaŭ la nigran ĉefgeneralon, kiu moviĝas unu paŝon antaŭen; la ruĝa ĉevalo moviĝas antaŭen de la 5-a al la 7-a, kaptas la nigran kanonon kaj faras mortan ŝakigon al la nigra ĉefgeneralo. La ruĝa partio gajnas la ludon.

2. Desegno: La ludantoj faras ian desegnon el ŝakpecoj, kiel lunarko en la bildo 2. Se la nigra partio la unua movas sian ŝakpecon, t.e. la ĉaron de la 3-a linio al la 4-a, kaj kaptas la ruĝan ĉevalon, li povas fari mortan ŝakigon al la ruĝa ĉefgeneralo. Se la ruĝa partio la unua movas sian ŝakpecon, li gajnas la venkon. La konkretaj paŝoj estas jene: La ruĝa soldato moviĝas de la 5-a al la 6-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, kiu moviĝas de la 4-a al la 5-a; la ruĝa soldato moviĝas de la 6-a unu paŝon antaŭen kaj ŝakigas denove la nigran ĉefgeneralon, la nigra gvardiano moviĝas antaŭen de la 5-a al la 4-a kaj kaptas la ruĝan soldaton; la ruĝa ĉevalo moviĝas antaŭen de la 5-a al la 3-a, kaptas la nigran soldaton kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, kiu moviĝas de la 5-a al la 6-a kaj kaptas la ruĝan kanonon; la ruĝa ĉaro moviĝas antaŭen de la 5-a al la 3-a, kaptas la nigran soldaton kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, kiu moviĝas de la 5-a al la 6-a kaj kaptas la ruĝan kanonon; la ruĝa ĉaro moviĝas antaŭen de la 5-a al la 3-a kaj ŝakigas denove la nigran ĉefgeneralon, la nigra elefanto retiriĝas de la 7-a al la 5-a kaj kaptas la ruĝan ĉaron; la ruĝa ĉevalo retiriĝas de la 3-a al la 5-a kaj faras mortan ŝakigon al la nigra ĉefgeneralo. Per tio la ruĝa partio gajnas la ludon.


3. Amuzo, kiu estas aranĝita ĝenerale laŭ iu temo, ne havas komplikan solvon, sed kun interese dismetitaj ŝakpecoj. En la bildo 3 la ruĝa partio posedas du gvardianojn kaj unu elefanton, dum la nigra partio du ĉarojn, du ĉevalojn, du kanonojn, du gvar-

Bildo 1 NIGRA PARTIO




RUĜA PARTIO

Bildo 2 NIGRA PARTIO



RUĜA PARTIO

Bildo 3 NIGRA PARTIO



RUĜA PARTIO

POR KOMENCANTOJ

# Kompleza nekonato en vojaĝo



LA trajno flugis en senlima kamparo, tamen mi ankoraŭ plendis, ke ĝi veturas malrapide. Eble tion kaŭzis la fakto, ke ĉiuj havas komfortan sidlokon, sed nur mi staras. Nenio mirinda estas, ke dum la ĉefsezono de turismo la trajnoj ĉiam estas plenaj de pasaĝeroj kaj ne ĉiuj pasaĝeroj povas havi sidlokon. Sed mi sentis malagrablecon kaj iom koleris, ĉar mi malofte vojaĝis.

Malfermiĝis la pordo de la intervagona balgo. Konduktoro enpuŝis servoĉaron por oferti bombonojn, gazetojn kaj ĵurnalojn. Mi aĉetis gazeton "Sub Nia Ĉielo", kia neniam povis veki ĉe mi intereson, por forigi la enuon. Sed legante la gazeton, mi sentis pli da enuo pro la sengusteco de la gazeto. Mi turnis la okulojn ekster la fenestron, sed la samaj kampoj, la monotonaj vilaĝoj dronigis min en pli forta enuo.

Ĝis la celloko restis pli ol 200 kilometroj. Mi taksis, ke mi devas ankoraŭ stari almenaŭ tri horojn. Kia sufero estas longtempe stari en skuanta vagono. Mi tenis min forte per krucitaj brakoj pro la skuado de la vagono.

Mian embarasiĝon rimarkis mezaĝulo sidanta apud mi. "Junulo, bonvolu sidi sur mia loko." Mi rigardis al li kaj trovis, ke li estas pli aĝa ol mi je almenaŭ 20 jaroj. Kaj pro tio mi fordankis lian afablan cedon: "Dankon, sed prefere vi sidu."

Mi ankoraŭ staris sola en la vagono, sed tiam jam kvietiĝis mia kolereto, kaj mi sentis varmon kaj dankemon. Pasis unu horo. La mezaĝulo subite leviĝis kaj diris al mi: "Sidu kelkan tempon, ke mi foriras fumi." Tiam mi sidiĝis senŝulde. Mi apogis min sur la komforta apogilo de la benko, laŭeble rektigis la doloran dorson kaj etendis la gambojn rigidiĝintajn. Poste mi fleksis la gambojn, etendis ilin kaj denove fleksis kaj etendis ilin. Pasis dek, dudek, tridek minutoj... Kiom da cigaredoj li volas fumi? Mi leviĝis kaj iris esplori la aferon.

Mi venis en la balgon kaj vidis la mezaĝulon rigardanta eksteren tra la fenestro. Liaj manoj, sen cigaredo, alkroĉiĝis al la tabio. Mi tuj komprenis, ke li pretekstis fumadon por cedi al mi la sidlokon. ■

---

dianojn kaj kvin soldatojn. Kvankam la ruĝa partio ne havas atakajn ŝakpecojn, tamen li povas gajni la ludon. La konkretaj movoj estas jene: La ruĝa elefanto moviĝas antaŭen de la 1-a al la 3-a, la nigra soldato moviĝas de la 7-a unu paŝon antaŭen; la ruĝa elefanto retiriĝas de la 3-a al la 1-a, la nigra soldato moviĝas de la 7-a unu paŝon antaŭen; la ruĝa elefanto moviĝas antaŭen de la 1-a al la 3-a kaj kaptas la nigran soldaton. La nigra partio ne povas movi sian ŝakpecon kaj tiel perdas la ludon.


*Ni jam konigis ĉinan ŝakon en ĉiuj numeroj de 1990. Interesitoj, ni pensas, eble ellernis ĝin. Ni deziras al ili pli grandan sukceson en ludo.*

**La Red.**

## Ĉu vi kredas viajn okulojn?

1. Kiu el la linioj AB kaj CD estas pli longa? (Vd. 3 bildojn.)

2. Ĉu estas nur unu glaso ĉi tie?



● Septembre de 1990 la oficeja sistemo HH-OA, kune farita de la Nov-teknika Disvolva Centro Haihua de Pekino kaj la Astronaŭtika kaj Aeronaŭtika Ministerio, sukcese trapasis la teknikan ekspertizon de la koncernaj instancoj de la ŝtato.

Sur individua komputilo laŭ tiu ĉi sistemo oni tajpas, faras tabelojn, kompostadon, simulelmontron kaj fine produktas la tajpaĵojn per punkto-matrica presilo. La ideogramoj estas 6-stilaj.

La oficeja sistemo HH-OA povas fari enmeton, komposti kaj presi, funkciante kiel komputilo, tajpilo kaj laser-presilo. Ĝi povas funkcii kaj kiel oficeja sistemo kaj kiel mikrokomputilo.

● Aŭguste de 1990 estis lanĉita la Shenyang-Dalian-a Aŭtovojo. Ĝi el 4 koridoroj longas 325 km. Laŭ projekto sur ĝi la aŭtoj povas kuri 100-120 km hore. Ĉiutage ĝi eltenas iradon de 50 000 veturiloj.

La aŭtovojo ligas kvin urbojn Shenyang, Liaoyang, Anshan, Yingkou kaj Dalian, tri havenojn kaj du internaciajn flughavenojn. Post ekfunkcio ĉiujare la aŭtovojo ŝparigas 400 milionojn da juanoj dank' al ŝparo de oleo kaj tempo kaj malpliigo de erodo de la aŭtoj. La aŭtovojo ludos gravan rolon en ekonomia vigliĝo kaj praktikado de la pordmalferma politiko por Liaodong-duoninsulo kaj eĉ la tuta Nordoriento de Ĉinio.

● La ĉina registaro decidis, ke la personoj de la landoj kaj regionoj havantaj diplomatiajn rilatojn aŭ oficialan komercon kun Ĉinio povas resti maksimume 15 tagojn en la urboj Haikou kaj Sanya de la Hainan-a Speciala Distrikto de Ĉinio por peti vizon aŭ enlandiĝon, se ili ne havas tempon por akiri vizon. Taiwan-anoj povas peti vojaĝateston de Haikou aŭ Sanya por iri al la ĉina kontinento. Se oni bezonas plilongigi la restadon en la provinco Hainan aŭ vojaĝi al aliaj lokoj de Ĉinio, ili devas tion fari laŭ la ekzistantaj difinoj.



La inaŭguro de la Shenyang-Dalian-a Aŭtovojo

● Konfuceo (551-479 a.K.) estis fama pensulo, politikisto kaj edukisto en la historio de Ĉinio. Konfuceanismo fondita de li estas multinflua kaj rigardata kiel simbolo de la orienta civilizacio. Konfuceo mem estas honorita kiel unu el la dek kulturaj famuloj en la monda historio. Tamen oni ne faris sisteman ordigon pri liaj vortoj, verkoj kaj studoj pri li. En marto de 1988 la eldonista rondo de Shandong-provinco prenis sur sin la taskon. Ili decidis eldoni kompleton da studaj materialoj pri konfuceanismo. Por plenumi tiun ĉi taskon ili konsultis preskaŭ ĉiujn grandajn bibliotekojn de Ĉinio, ellaboris planon pri "Enciklopedio de Konfuceo": En 10 jaroj eldoni 500 titolojn de libroj kun 100 milionoj da ideogramoj. Laŭ tiu ĉi plano la kompleto da libroj longos 20 metrojn.

● Dank' al 2-jara penado la Agronomia Instituto de Shandong-provinco sukcesis per sorbilo sorbi kalion el salakvo ellasita post saligo en salejo. Per tiu metodo oni povas produkti unu tunon da bonkvalita sinteza sterko el 10 tunoj da salakvo. La produktado per tiu ĉi nova metodo mildiĝos la kalian mankon de Ĉinio.

● Kosmopolvo estas tiel malgranda, ke neniu vidis ĝian falon. Antaŭ nelonge ĉinaj oceanografoj ŝipveturis al Pacifiko por kolekti kosmopolvon. Ili ne nur la unuaj en la mondo trovis kosmopolvon kun orflava nikelfera kerno, sed ankaŭ malkovris, ke la proporcio de la strukturo de la polvero estas simila al tiu de la terglobo.

● La 3-an de septembro la unua ĉina balon-satelito "Daqi la Unua" eniris en sian orbiton.

Kunportata de la dua meteo-




La oficeja sistemo HH-OA

rologia satelito "Fengyun la Unua", ĝi estas lanĉita per la transporta raketo "Changzheng la Kvara". La sukcesa lanĉo de "Daqi la Unua" liveris al Ĉinio donitaĵojn pri la atmosfera denseco en la loko 400-900 km alta super la tero, kiujn Ĉinio ne konis antaŭe.

● Sankciite de la registaro de Sichuan-provinco, fondiĝis en la urbo Dujiangyan la Internacia Vivscienca Instituto, la unua establo tiufaka en Ĉinio. Ĝi studas ĉefe la sciencon de la homa korpo, eksterordinarajn funkciojn de homoj, medicinon, luktarton uŝu-o, ĉigong-on kaj tradician ĉinan kulturon. En la instituto funkcias koncernaj studorganizoj, elementa, meza kaj supera kursoj. Ĝi havas filiojn en la urboj Pekino kaj Chengdu.


● Antaŭ nelonge la Juĝkomitato de Azia Kulturo de Fukuoka de Japanio decidis doni Specialan Azian Kulturan Premion de Fukuoka al ĉina fama literaturisto kaj veterana esperantisto Bakin kaj aliaj 4 personoj pro ilia kontribuo al la azia kulturo.

● Himalajo meznombre alta 6 000 metrojn super la marnivelo, la plej alta montaro, estas honorita kiel tegmento de la mondo. Antaŭ nelonge la Ĉina Akademio de Sciencoj asertis, ke pro plurfoja montkrea movado la loko de la nuna Himalajo komencis leviĝi antaŭ 2 milionoj da jaroj kaj fariĝis montaro. Poste pro la interpuŝiĝo de la hinda plato kun la eŭrop-azia plato plue leviĝis la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Nun la leviĝo daŭras, sed malrapide.

● En Ĉinio 26.48 milionoj da loĝantoj ĝuas ŝtatpagan kuracadon, kio pruvas la avantaĝon de socialismo. Sole en 1989 la ŝtato pagis por tio 3.799 miliardojn da juanoj. La ŝtatpaga sistemo praktikiĝis jam 38 jarojn, kio liberigis la vastajn amasojn da laboristoj, oficistoj kaj studentoj el mona embaraso pri kuraco.

● Ĉigong-terapio kontraŭ adipozo estas kreita de Zhang Yunshun de la Orienta Esplorcentro por Fortikigo kaj Sveltigo. Per tiu terapio oni povas malpezigi sin meznombre 250 gramojn ĉiutage en la daŭro de unu monato. Pluraj malsanoj pro adipozo mildiĝis aŭ malaperis.

La transporta raketo kun la satelito "Fengyun la Unua" lanĉita



● 460 000 emeritoj de 70 kaj pli da jaroj ricevos avantaĝan atestilon. Kun ĝi ili ĝuos rajton aĉeti bileton de aŭto, fervojo, aviadilo kaj ŝipo iranta sur Yangzi-rivero antaŭ aliaj kaj eniri en la veturilon antaŭ aliaj pasaĝeroj.


● Antaŭ nelonge oni malkovris la plej grandan en la mondo naturan eĥan muron profunde en Taihang-montaro, Zanhuang-gubernio, Hebei-provinco.

La barelforma muro situas en la meza parto de la pitoreskejo. Ĝi havas malgrandan enirejon kaj grandan internon kaj estas duoncirkla. La muro aŭdigas klaran eĥon al parolo de ĉiu ajn direkto. Fakuloj opinias, ke ĝi formiĝis antaŭ ĉ. 100 milionoj da jaroj pro geologia ŝanĝiĝo. Ĝi estas ne nur alloga por turistoj, sed ankaŭ valora por geologio, geografio, geomorfologio, geomekaniko kaj akustiko.

● Antaŭ nelonge ekfunkciis la Cirkla Kinoteatro "Granda Muro", konstruita kunlabore de Ĉinio kaj Japanio. Ĝi, situanta ĉe Badaling, projekcias filmojn pri la Granda Muro, kiuj enhavas la antikvaĵojn de la Granda Muro 6 000 km longa, ĝiajn pejzaĝojn en la kvar sezonoj kaj historiajn rakontojn koncerne ĝian konstruadon. Per avangarda tekniko la kinejo kun stereofonia ekipaĵo projekcias sur 360-grada ekrano. Rigardante la filmon, oni sentas sin kvazaŭ en la spaco de la Granda Muro.

# Ĝardenoj de Yangzhou

Fotoj de **LIU SIGONG**




La ponto super la lago



Heting-kiosko en Geyuan-ĝardeno




Kortosimila ĝardeno



Yangzhou de Jiangsu-provinco estas fama turisma urbo de Ĉinio. En la urbo dislokiĝas diversformaj elegantaj ĝardenoj. Ili ĝuas renomon de la antikveco. El la multaj ĝardenoj plej famas la Mallarĝa Okcidenta Lago (Shouxi-lago) en la okcidenta parto de la urbo. Ĝi estas konstruita surbaze de naturaj pejzaĝoj. Tie oni povas ĝui multajn vidindaĵojn, kiaj la Malgranda Ora Monto, Fiŝhoka Teraso, Kvinkioska Ponto kaj Blanka Pagodo. Ili konsistigas buntajn pejzaĝojn. La svelta lago zigzagas kun ombroj de arboj sur si. Ne mankas al ĝi elegantaj kioskoj kaj pavilonoj, kaj ĝi vidigas la imponecon de pejzaĝoj de norda Ĉinio kaj la belecon de tiuj de suda Ĉinio. En la urbo troviĝas ankau/ aliaj ĝardenoj, kiaj Heyuan, Geyuan, Yechunyuan kaj Xiaopangu.

La Kvinkioska Ponto ĉe sunsubiro



# Alilandaj studentoj en la Pekina Universitato

Teksto de **TAN JUN**

Fotoj de **WANG WENQUAN**

ILI venis kun vigla juneco kaj serena rideto, sincera amikeco kaj soifo pri scioj.

Ili estas alilandaj studentoj lernantaj en la Pekina Universitato. Ili parolas malsamajn lingvojn, tamen ili kolektiĝis en tiu universitato ĉiam plena de viveco, pro sia amo al la ĉina kulturo kaj sopiro al la ĉina antikva civilizacio. Ili havas malsamajn haŭtkolorojn, tamen ili ricevis egale fervoran helpon kaj amikan gastigadon.

Oni povas diri, ke ili estas feliĉaj, ĉar tie ili povas ricevi rektan instruadon de famaj ĉinaj erudiciuloj. Jen japana studento havas intiman interparolon kun la filozofia majstro Feng Youlan; profesoro Chen Yixin de la ĉinlingva fakultato klarigas al usona studentino poemon de Tang-dinastio en sia hejmo; fama aktoro pri humura dialogo s-ro Jiang Kun ridigas ĉiujn per siaj spritaĵoj; kaj s-ro Liang Houmin ĝuigas la spektantojn per *kuajban*, unu el la multaj specoj de popolaj buŝaj artprezentaĵoj de Ĉinio.

Ili estas diligentaj. Ĉion ili devas lerni dekomence, ekzemple skribi ideogramojn strekon post streko en leciono kaj uzi manĝbastonetojn dum manĝado. La brila kulturo kiel grandega magneto altiras ilin, ke ili soife lernas. Tie ili ekkomprenis, ke "diligenteco estas la vojo al la kulmino de scioj, penado — la ŝipo al la kontraŭa marbordo".

La senlacaj figuroj kaj atentaj vizaĝoj solvis la enigmon, kial alilandaj studentoj de la Pekina Universitato gajnis ĉampionecojn unu post alia en inteligentecaj konkursoj pri "Scioj pri Ĉinio" kaj aliaj konkursoj. Iliaj instruistoj laŭdis: "Iliajn sukcesojn ni devas ŝuldi al ilia diligenteco." Sed ili diris: "Eminentaj instruistoj elbakas elstarajn lernantojn."

Ĉie en la universitato oni povas renkontiĝi kun alilandaj studentoj. Ili absorbite kaj serioze faras la gimnastikon Tajĝiĉuan. En vestoj kun presitaj sloga-



Prof. Chen Yixin (maldekstre) klarigas poemon de Tang-dinastio al alilanda studentino.




Japanaj studentoj festas la naskiĝtagon de sia kolego en aparta maniero.

noj "Pace reiru hejmen" kaj "Ĝojeiru al laboro", ili paŝas surstrate memkontente. En serena tago ili malstreĉite kuŝas sur gazono, kio aldonas al la universitato ekzotan etoson.

Partopreni en teatra prezentado estas granda ĝojo por la alilandaj studentoj. Ili povas perfekte ludi rolojn de alilandanoj en filmoj aŭ televidfilmoj. En la lastaj jaroj ili ludis en filmoj kaj televidfilmoj, kiel "Imperiestra Patrino Cixi" kaj "Na Wu". Tamen ili ne kontentis, ke ili ludis nur malĉefajn rolojn. La de ili prezentataj teatraĵetoj "La Familia Afero", "Reveno en Nokto" kaj "Adaptaĵo de Kong Yiji" estis telesendataj de televida stacio. Brazila studentino Raquel Picchi Mardns kaj tanzania studentino Amal prezentis kune kun famaj ĉinaj aktoroj pri humura dialogo. Kanada studento Rowsweel ludis la rolon de Dashan en komedio, kio faris lin vaste konata "komedisto". Antaŭ nelonge s-ro Jiang Kun akceptis lin kiel sian disĉiplon, kaj oni simple nomas lin Dashan.

Ĉinaj popolaj kantoj kaj muzikaĵoj tre interesas la alilandajn studentojn. Ili ludas fluton, *ĝeng*-on (speco de antikva dekkelk-korda instrumento), dukordan muzikilon k.a. Studentino en teatra kostumo kantas pecon de "Printempa rivero en bela nokto". Ŝi bone montras la temperamenton de antikva ĉina belulino.

La alilandaj studentoj ofte vojaĝis suden kaj norden en libera tempo por koni la ĉinan socion. Ili interparolis kun laboristoj en la Ĉefurba Ŝtala Kompanio, ĝuis pejzaĝojn de Lancang-rivero, ĝojkriis en la Vilaĝo de Aziaj Sportistoj kaj ridegis sur la Granda Muro. Preskaŭ ili ĉiuj povoscias kanti la kanton "Kuraĝe antaŭeniru, franjo!" de la filmo "Ruĝaj Sorgoj". La studentoj el diversaj landoj ĉiu havas sian preferon. Iuj ŝatas ludi la ĉinan ŝakon kaj lerni la ĉinan kaligrafion, aliaj ŝatas frandi sukertegitajn kratagajn fruktojn sur bastoneto kaj bakitan batatón, kaj triaj ŝatas sin amuzi per surtera boato kaj



Hartondado ĉe strato


flugigi kajton. Multaj ĉinaj aferoj estas tre interesaj por ili.

Nun en la Pekina Universitato konstante lernas ĉ. 600 alilandaj studentoj, i.a. 500 alilandaj lernantoj vizitas mallongajn kursojn ĉiujare. Nombro post nombro da alilandaj studentoj venis, nombro post nombro da ili adiaŭis. Kiam ili finis la lernadon, ili ne forgesis, ke dimanĉe ili faris farĉitajn pastobulojn en la hejmo de sia instruisto, ke ili manĝis festkukojn antaŭvespere de Kristnasko preparitajn de la universitato, kaj ke ili mano en mano kantis "La mondo estu plena de amo" en la antaŭvespero de nova jaro.

Ili foriris kun amikeco kaj scioj, tamen ili senlace laboras por akceli la diplomatian, ekonomian kaj kulturan interŝanĝojn kun Ĉinio, ĉiam memorante la edukadon de la universitato. S-ro Glige Dzukic, unu el la unuaj jugoslavaj studentoj en Ĉinio en la 50-aj jaroj, nun laboras kiel ambasadoro en Ĉinio. S-ro Michael Kahn-Ackermann, kiu lernis en la Pekina Universitato en la 70-aj jaroj, funkcias kiel rektoro de la Pekina Filio de Instituto de Goeto. Usona studento Elyse Beth Silverberg fariĝis vicĉefdirektoro de la Usona-Ĉina Industria Korporacio de Reciproka Utilo. S-ro Frideric Cho nun estas ĉefdelegito de la Sveda Komerca Banko en Ĉinio... Ne estas troe diri, ke ĉie dissemiĝas diplomitoj de la Pekina Universitato. ■




Ŝnurtira konkurso



Studentoj el Sri-Lankao

En kajta festivalo





En prezentado de la dramo "Adaptaĵo de Kong Yiji"



Leciono en la Antikva Observatorio

Alilandaj studentoj en la Pekina Universitato



# Filmado sur malnovaj vojoj de la Flava Rivero

## — Pri filmado de la larĝekrana muzik-filmo "Kanto de la Flava Rivero"

Teksto de **DONG PING**

LASTATEMPE Teng Wenji, fama reĝisoro de la Xi'an-a Studio, plenumis filmadon de la kolora larĝekrana muzik-filmo "Kanto de la Flava Rivero".

"Kanto de la Flava Rivero" priskribas muliston Dang Gui, kiu laboris sur malnovaj vojoj de la Flava Rivero kaj multe suferis dum sia tuta vivo. En sia infaneco li vivis povran vivon. En sia juneco li amis knabinon Hong Hua, tamen li, malriĉa, ne povis edziĝi al ŝi. Mezaĝa, li feliĉe kunvivis kun Liu Lan, edzino de bandito Nigra Osto. Poste Liu Lan denove revenis al Nigra Osto. En sia maljuneco Dang Gui edzinigis Yingzi, filinon de Liu Lan, al junulo vivanta trans la Flava Rivero, tiel ke li realigis sian deziron de la tuta vivo. Ĝuste estas tiuj simplaj homoj, kia Dang Gui, heredis la ĉinan kulturon kaj montris la viglan kaj neflekseblan spiriton de la ĉina nacio. La filmo estas akompanata de impona kaj infekta simfonio el 4 movimentoj.

Tio estas la 12-a filmo reĝisorita de s-ro Teng kaj lia unua filmo pri okcidenta Ĉinio. Por plenumi ĝin li kaj liaj kolegoj multe ŝvitis kaj spertis grandajn malfacilojn.

### MALFACILA FILMADO

Aŭguste de 1988, oni komencis la filmadon de "Kanto de la Flava Rivero" kaj elektis kiel la unuan lokan planon malnovajn vojojn de la Flava Rivero en Zhongwei-gubernio, Ningxia-a Hui-nacieca Aŭtonoma Regiono. Por la filmado oni devis transiri ĉiutage la riveron en antikva maniero: kunligi pramon per pulioj kun ŝtala kablo super la rivero kaj treni per vinĉo la pramon trans la riveron. Ir-reira veturo bezonis 3 horojn. Filmante 40 tagojn sur malnovaj vojoj de la Flava Rivero la filmistoj 40-foje faris tian transiron. La loko estas dezerta, sen ombrejo kaj ŝirmilo. Sub la aŭgusta suno, la aktoroj ja devis porti peltaĵon. Ĉe la manĝado, forta vento ofte sablis ilian bovlon. La vivkondiĉoj estis malbonaj.

Ĉar "Kanto de la Flava Rivero" montras la vivon de mulisto, tial ankaŭ brutoj multe vidiĝis en la filmo. En la unua tago de la filmado antaŭ la objektivo aperis pli ol 70 muloj, kameloj kaj ĉevaloj. Kiam la reĝisoro kriis "Komencu la filmadon!", malmilda mulo neatendite surpriziĝis kaj ektumultis ankaŭ aliaj brutoj. Ĉio falis en malordon, ĉar la brutoj estis pruntitaj de indiĝenoj kaj neniam spertis tiun scenon. La reĝisoro devigite decidis ĉesigi la filmadon por dresi la brutojn.

### JINGBIAN-A YANGGE-DANCA GRUPO

En septembra tago de 1989, aŭdiĝis laŭta tamburado en sabla valo sur malnova vojo de la Flava Rivero. 300 homoj gaje dancis en du grupoj. Subite leviĝis nubo da flava polvo. La sceno estis impona. Jen "festaj amuzaĵoj", sceno de la filmo. La grandioza grupo de popola kant-danco estis invitita el Jingbian-gubernio pli ol 500 km fore.

Yangge-danco de Jingbian-gubernio estas fama en la nordo de Shaanxi-provinco. Tie ĉiuj dancas kaj troviĝas multaj lertaj dancistoj. Por la filmado, la gubernia registaro speciale engaĝis pli ol 200 popolajn dancistojn kaj organizis Yangge-dancan grupon, kiun partoprenis ankaŭ 80 aktoroj el la gubernia teatro kaj teatra lernejo. El ili estas multaj geedzaj paroj. Inter ili estas ankaŭ patroj kaj filinoj. Maltimante penegon, ili senĉese provludis kaj en nur 10 tagoj oni perfekte finfilmis tiun grandiozan scenon de "festaj amuzaĵoj" prezentantan la morojn de la nordokcidentaj ĉinoj.


### MALJUNA MORA KONSILANTO

En la fino de la filmo oni vidas, ke, adiaŭinte sian adoptan filinon ĉe bordo de la Flava Rivero, maljuna Dang Gui kantis kanton de boatisto: "La Flava Rivero 99-foje kurbiĝas..." La kantanto estas Li Zhiwen, mora konsilanto de la filmo.

La 59-jara Li estas legomo-

kulturisto en Shaanxi-provinco. Ekde sia 6-jaraĝo li sekvis sian avon en gardado de brutoj. La peniga vivo de brutistoj sonorigis lian voĉon. Fama estas la de li kantata popolkanto. En la 50-aj jaroj li estis elektita de la popolkanta trupo de la Centra Ensemblo de Ĉinio. Poste li grave malsaniĝis. Kuracistoj diagnozis, ke li suferas de septicemio. Reveninte hejmen de Pekino, li ne pasive atendis la morton, sed daŭrigis sian kantadon. Pasis pluraj jaroj. Li ja ne mortis, sed male, resaniĝis. Al la filmo "Kanto de la Flava Rivero" oni ja adaptis lian mulistan vivon.

Kiel mora konsilanto de la filmo-produkta servo, s-ro Li estis tre okupita. Oni lernis de li dialektojn de la norda Shaanxi kaj Yangge-dancon, demandis lin pri la vestoformoj kaj demandis, kiel ŝnuri brutojn, kiel mebli ĉambrojn ktp. S-ro Li havas ankaŭ nemalmultajn apartajn teknikojn, ekz., liaj hoto-krioj por peli kaj kvietigi brutojn estas admirindaj. La aktoro, kiu ludas la rolon de Dang Gui, foje-refoje lernis de li tiun teknikon. Dank' al tio, tiu aktoro lerte ludis dum la filmado kaj perfekte enpersonigis Dang Gui en la filmo. ■



Mulisto Dang Gui kantanta



Hong Hua kaj Dang Gui



Nigra Osto



Hong Hua devigite edziniĝis al maljuna kaj malsana forĝisto.

Dang Gui vivas kune kun Liu Lan kaj ŝia filino .




Grandioza sceno de "festaj amuzaĵoj"







Ying Zi (meze), kiu edziniĝos al junulo trans la Flava Rivero



Reĝisoro Teng Wenji (la dua de maldekstre)





世界语《中国报道》一九九〇年第十二期（本刊代号：二——九一五）国内统一刊号：CN11-1339